


esperanto

septembro 1968

61-a jaro

n-ro 754 (9)

universala esperanto - asocio (en konsultaj rilatoj kun u.n.e.s.c.o.)



Vi trovos

en tiu ĉi kongresa eldono de "Esperanto" raportojn pri ĉiuj pli gravaj aranĝoj de la 53-a Universala Kongreso de Esperanto en Madrid (3-10 aŭgusto). Ne eblas en la limoj de 20-paĝa revuo ampleksi ĉiujn vidpunktojn pri ĉiuj programeroj: laboraj, kulturaj aŭ distraj. Oficiala organo devas, evidente, doni la ĉefan emfazon al la kongreslaboroj kaj ties rezultoj. Tamen, por aldoni almenaŭ unu alian vidpunkton al tiu de la redaktoro, ni publikigas ĉi-foje specimenan intervjuon (sur p. 132).

Ni memorigu ankoraŭfoje, ke la paĝoj de "Esperanto" estas publikaj, kaj ke ni volonte ricevos kaj laŭeble ankaŭ aperigos leterojn de la legantoj, ankaŭ pri la Universala Kongreso. Raporto pri la TEJO-Kongreso, kiel ankaŭ la regulaj rubrikoj recenza, novaĵa k.a., aperos en la oktobra "Esperanto".

La kovrilo

montras, el pluraj anguloj, la laboron de la Komitato de UEA. En Madrid ĉeestis 50 komitatanoj aŭ anstataŭantoj – verŝajne rekordo.

La fotojn ni dankas al la Kongresa Foto-servo. La portreton de Andreo Szabó (p. 129) ni dankas al Elizabeta Regöci-Szabó.

Enhavo

- 117 Sub la signo de homaj rajtoj: rezultoj de la 53a UK
- 118 Kelkaj fundamentaj tezoj de prof. I. Lapenna (Parolado)
- 122 Lingva diskriminacio en unuopaj landoj: stimulaĵ diskutoj en kunveno de UEA
- 124 Diplomatoj konas bezonon, vidas solvon (Inaŭguro)
- 126 Rezolucio 1: Por la Homaj Rajtoj
Rezolucio 2: Esperanto kaj turismo
- 127 Vigla, varia Somera Universitato
- 128 Konkursoj malkovris novajn talentojn
Teatraj vesperoj: IAT 10-jara
- 130 Arta vespero kaj muzikaj eroj
- 131 "Ni jam povas fari efikan premon": La Solena Fermo
La dua Kunveno de UEA
M. H. Vermaas: nova Honora Membro
- 132 Senrubrikaj notoj el la kvindek-tria
Intervjuo kun kongresano
- 133 Dum la Kongresa periodo aperis... (novaj eldonaĵoj)
Varsovio triobligas (Esperanto en radio)
- 134 Kapitalo Hodler 68: Unua centmilo atingita!
Forpasis Hans Kürsteiner, Honora Prezidanto de UEA
- 135 Oficiala informilo n-ro 415
- 136 Anoncetoj

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1883-1910).

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Redaktoro: D-ro V. Sadler.

Abonprezo por unu kalendara jaro: 18,75 gld. (kun membreco kaj Jarlibro: 25,— gld.). Unuopa ekzemplero: 1,— gld.

Banko: Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-1.

Ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telefono: (010) 23 27 88.

Telegramoj:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Presejo: Drukkerij Zwagers, Rotterdam-6.

Legantoj en ĉirkaŭ 80 landoj.

estraro de uea

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj kaj kulturaj rilatoj: Prof. d-ro Ivo Lapenna, 77 Grasmere Ave., Wembley, Mddx, Britujo.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri administrado: S-ro E. L. M. Wensing, Postbus 412, Eindhoven, Nederlando.

Vic-prezidanto kaj estrarano por diskonigo de la agado de UEA: S-ro E. Carlén, Yxhult, S 690 60 Hällabrottet, Svedujo. Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado kaj kongresoj: S-ro G. Becker, D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 4, Germanujo.

Estrarano pri turismo: S-ro M. Jaumotte, 44 de Bruynlaan, Wilrijk-Antwerpen, Belgujo.

Estrarano pri lernejoj: S-ro J. Toczyski, skr. p. 57, Gdańsk 1, Polujo.

Estrarano pri financoj: S-ro E. J. Woessink, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj: D-ro Peter Zlatnar, Rimska 7/II, Ljubljana, Jugoslavio.

Reprezentanto de TEJO ĉe la Estraro de UEA: S-ro Ulrich Lins, D-5 Köln-Dellbrück, Gemarkenstr. 146, Germanujo.

SUB LA SIGNO DE HOMAJ RAJTOJ:

Rezultoj de la 53a UK en Madrid

Mil sepcent sepdek kongresanoj el 38 landoj partoprenis de la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto la 53-an Universalan Kongreson de Esperanto en la hispana ĉefurbo Madrid. Laborkunsidoj dediĉitaj al aspektoj de la Homaj Rajtoj, la aranĝoj de la 4-a Internacia Arta Festivalo kaj varia distra programo kune signifis, kiel kutime, okupoplenan semajnon. Ĉi-sube ni resumas tute koncize la ĉefajn rezultojn de la Kongreso kaj la konkretajn decidojn de la Komitato kaj Estraro de UEA.

Pasis la 53-a Universala Kongreso de Esperanto, la plej grava manifestacio de la movado en la Jaro de Homaj Rajtoj. Dum unu kunveno post alia tuŝis la Homajn Rajtojn — kaj precipe lingvajn rajtojn —, estis sentebla nova batala spirito penetranta en ĉiujn laborojn kaj stampanta tiun ĉi 53-an Kongreson kiel iasence startopunkton. Fine la movado, kaj tial ankaŭ ĝiaj kongresoj, komencas turni sin eksteren.

Forumo pri lingva diskriminacio

La ĉefa forumo pri tiu ĉi temo estis la 1-a Ĝenerala Kunveno de UEA, dediĉita al "Kulturaj rajtoj kaj lingva diskriminacio", kaj ĝi montriĝis unu el la plej viglaj kaj fruktodonaj de tre multaj jaroj (Raporto: p. 122). Ne mirinde, do, ke ĵurnaloj kiel la pariza "Figaro" elektis akcenti ĝuste la temon de lingva diskriminacio en siaj raportoj, ceteraj tre pozitivaj.

La Asocion plue prezidas prof. Lapenna. Laborinte precize 30 jarojn en la Estraro, li decidis prezenti al la Komitato en Madrid la eblecon elekti novan prezidanton. Nek la Komitato, nek la Kongreso kiel tuto estis preta akcepti tiun proponon, kaj la prezidanto konsentis plue ofici, je difinitaj kondiĉoj (vidu la sekvantajn paĝojn). Siaflanke, la Komitato decidis mallongigi sian mandaton, kio signifas, ke okazos novaj elektoj jam en 1969 kun la celo sisteme renovigi kaj plijunigi la gvidajn organojn.

Kaj la Estraro kaj la Komitato ĝisfine tralaboris siajn ampleksajn tagordojn. El 8 estraranoj ĉeestis 6 (plus la reprezentanto de TEJO; s-ro Toczyski kaj d-ro Zlatnar ne povis ĉeesti la Kongreson). El entute 70 komitatanoj ĉeestis 50, ĉu persone, ĉu per anstataŭanto — verŝajne rekorda nombro.

Redistribuo de estraraj taskoj

La Estraro kunsidis entute kvarfoje. Ĝi iom redistribuis inter siaj anoj la respondecojn: vic-prezidanto Carlén estas nun ŝargita pri diskonigo de la agado de UEA kaj pri la Semajno de Internacia Amikeco, unuafoje okazonta ĉirkaŭ februaro de 1969. La ĝenerala sekretario transprenis la fakon kongresoj de d-ro Zlatnar, kiu estonte okupiĝos pri landaj kaj fakaj asocioj kaj pri la delegitaro. S-ro Jaumotte fariĝis estrarano pri turismo. La ceteraj taskoj restas sen ŝanĝo.

Kiuj atendadas streĉe decidon pri kongresurboj por 1970 kaj 1971, devos iom ankoraŭ pacienci: definitiva decido ne aperos antaŭ decembro. Aliflanke, laŭ ĵusa decido de la Estraro, ili jam povas aliĝi por Portland en 1972. Kiuj aliĝos antaŭ la 1-a de januaro 1971, ricevos specialan rabaton de 10,— gld. Post plurjaraj esploroj, la Komitato nun akceptis reviziitan Kongresan Regularon, publikigotan ĉi-jare.

Diskutoj pri la asociaj financoj disvolviĝis plejparte rutine. Oni kun aparta plezuro konstatis, ke la nova lanĉita Kapitalo Hodler 68 jam atingis la sumon de 105 000 gld. — pri la progresoj de la kampanjo vidu p. 134.

Pri eldonaĵoj la ĉefaj novaĵoj estas jenaj: Tuj antaŭ la Kongreso aperis la n-ro 9 en la Serio Oriento-Okcidento de UEA: "El la vivo de Syunkin" de la japana aŭtoro Tanizaki. La unua eldono de la nova revuo de CED "La Monda Lingvo-Problemo" estas jam kompostita kaj eliros laŭplane la 10-an de decembro. Por "Plena Ilustrita Vortaro", kiun eldonos SAT, se troviĝos minimume 2000 aĉetontoj, UEA jam kolektis pli ol 400 aĉetpromesojn aldone al pli ol 1200 ricevitaj ĉe SAT. Sekve mankas jam nur kelkaj centoj por certigi la eldonon. (Vidu denove: junio, p. 77). Kun la Jarlibro 1969 ĉiuj membroj ricevos novan eldonon de la Statuto kaj ĉiuj Regularoj de UEA; kun tiu de 1970 ili ricevos aŭtomobilan terminaron.

Prof. Lapenna kandidato por UN-premio

Por kroni tiun ĉi resumon de la kongresaj laboroj jen du decidoj unuanimaj de la Komitato: UEA proponos kandidaton por unu el la premioj por elstaraj kontribuoj sur la kampo de Homaj Rajtoj, kiujn aljuĝas Unuiĝintaj Nacioj ekde 1968. La kandidato estos prof. d-ro Ivo Lapenna, kiu sendube faris sur tiu kampo pli multe, ol kiu ajn alia en la Asocio. Due, la Asocio havas novan Honoran Membron: f-ino M. H. Vermaas, elektita per aklamado pro ŝiaj grandaj meritoj por la Asocio.

Ne estas hazarde, ke tiu ĉi resumo akcentis la laboran flankon de la 53-a UK. Malgraŭ ke ĝi enkadrigis en si la 4-an Internacian Artan Festivalon, malgraŭ ke ĝi donis al la 1770 kongresanoj sufiĉajn okazojn por malstreĉiĝo, elstaris antaŭ ĉio la laboro plenumita. Kaj tiel ja devus esti.

KELKAJ FUNDAMENTAJ TEZOJ

de prof. I. Lapenna

**bazitaj sur la malferma
parolado de la
53a Universala Kongreso
de Esperanto**

La lingva situacio en la mondo kaj la evolutendencoj, kiujn ĝi entenas, unuflanke, la aktuala pozicio de la Internacia Lingvo kaj ĝiaj perspektivoj por la estonteco, aliflanke, postulas klaran difinon de la rolo de la Esperanto-organizaĵoj kaj de la laborprincipoj de iliaj gvidaj instancoj. Ne altrudante mian opinion al kiu ajn, mi deziras koncize formuli mian propran starpunkton en la sekvantaj tezoj:

1. Kiel ĉiuj seriozaj observantoj antaŭvidis jam antaŭ multaj jaroj, la lingva problemo en la mondo devis necese komplikiĝi pro la antagonismo inter la kreskantaj bezonoj de komunikado kaj la lingvodiverseco, kiu obstaklas la kontentigon de la bezonoj. Tio kondukis al la nuna absurde neracia stato, karakterizita

Sabaton, la 3-an de aŭgusto, la prezidanto de UEA prezentis al la Komitato sian eksiĝon por ebligi al ĝi elekti novan prezidanton. Servinte 30 jarojn en la Estraro de la Asocio, li trovis la momenton konvena por proponi sian retiriĝon.

Al tiu ĉi propono respondis unu komitatano post alia: ĉiu esprimis la plej altan aprezon por la laboro de la prezidanto kaj insiste petis lin ne forlasi la oficon. La prezidanto tamen ne retiris sian proponon, sed petis la elekto-komisionon efektive kaj zorge pristudi ĝin dum la venontaj tagoj.

Kiam rekunvenis la Komitato mardon, la 6-an de aŭgusto, la komisiono pri elektoj prezentis raporton, en kiu ĝi konstatis la "unuaniman aprobon de la festparolado de prof. Lapenna flanke de la kongresanaro" kaj akceptis "kun sincera aprobo la deziron de la esperantistaro havi ankaŭ estonte profesoron Lapenna kiel prezidanton de UEA". Ĝi invitis la prezidanton "esprimi mem al la Komitato la kondiĉojn, kiujn li opinias necesaj por pli efika kaj sukcesa funkciado de UEA".

La ĉi-supraj "kelkaj fundamentaj tezoj" estas la respondo al tiu invito aprobita de la Komitato. La prezidanto deklaris, ke li pretas plue funkcii kiel prezidanto nur sub la kondiĉo, ke la Komitato ne nur aprobu la ideojn entenatajn en la supraj tezoj kiel esencan bazon de laboro, sed ankaŭ donu al li kaj al la Estraro efikan kaj efektivan helpon en ilia realigo. La Komitato unuanime aprobis la ideojn de la tezaro kaj akceptis la kondiĉojn de la prezidanto.

de tensioj kaj diversformaj prilingvaj luktoj sur internacia kaj nacia niveloj. *En ĉiuj siaj aspektoj la lingvo-problemo konstante akriĝas kaj tial ĉiam pli impete postulas radikalan solvon.*

Evoluo favoras nian solvon

2. Science analizi sociajn fenomenojn, inkluzive la pritraktatan, signifas rigardi ilin ne statike, sed dinamike; ne en formo de senmovaj statoj, sed en tiu de evoluprocezoj. La dinamismo sur la lingva kampo klare indikas, ke *la evoluprocezo direktiĝos pli aŭ malpli frue, sed tute certe, al la solvo, por kiu ni pledas*, ĉar tiu solvo prezentiĝas kiel sintezo de la konfliktaĵoj intereso de naciismo kaj internaciismo: de la firma volo de la popoloj kaj etnaj grupoj konservi siajn respektivajn lingvojn kaj siajn identecojn, unuflanke, kaj la postulatoj de mondvasta komunikado sur ĉiuj niveloj aliflanke.

Konvinko el objektiva analizo

3. La ekzisto mem de la Esperanto-organizaĵoj, kaj entute la laboro por la Internacia Lingvo en kia ajn formo, havas sencon, nur se la du supraj premisoj estas ĝustaj. Se ili ne estus ĝustaj, la sola prudenta ago estus disigi ĉiujn organizaĵojn kaj senprokraste ĉesigi ĉian ajn agadon por Esperanto, ĉar la organizaĵoj povus nenion atingi kaj la laboro estus komplete sensenca. Por mi la solvo de la lingvoproblemo per Esperanto, kun ĉiuj pozitivaj kromefikoj, estas afero ne de espero aŭ de naiva fido, sed de firma konvinko bazita sur objektiva analizo de faktoj. *Foresto de tia konvinko estas fonto de duboj kaj ne malofte eĉ de defetismo.* Evidente, en la gvidaj instancoj de la Esperanto-organizaĵoj, unuavice de UEA, devas troviĝi personoj, kiuj, pro sia konvinko aŭ, se ili ne havis la eblecon mem studi la demandon, pro sia senŝancela fido al

Flagoj hispanaj
kaj Esperantaj
flirtas antaŭ
la multetaĝa
kongresejo
"Palacio de
sindicatos",
vid-al-vide de
la glora muzeo
"El Prado".



Defetismo ne allasebla

la konkludoj atingitaj de la studintoj, estas kapablaj mem firme agi kaj disradii ĉirkaŭ si senkompromisan firmecon. *Defetismo ne estas allasebla sur kiu ajn nivelo de batalanta movado kiel la nia, malpli ol kie ajn, en ĝiaj gvidaj organoj aŭ publikaĵoj.*

Konservi la lingvan unuecon

4. Por rapidigi la solvon necesas, ke la rimedo estu kiel eble plej ellaborita, maksimume perfekta, tiel ke en ĉiu momento ĝi plene taŭgu por la samtempaj bezonoj de internacia komunikado en ĉiuj sferoj de la vivo. Tio signifas, ke necesas daŭre evoluigadi la lingvon, praktike ĝin uzadi, riĉigadi ĝin per nova kultura enhavo, sed samtempe *konservi ĝian absolutan unuecon*. Tiun rolon plenumas la kreskanta literaturo kaj la vastiĝanta uzo de la lingvo sur diversaj kampoj. Siavice, la ampleksiĝo de la praktikaj aplikoj de la lingvo entenas danĝerojn por la lingvounueco. En tiaj kondiĉoj la rolo de la Akademio de Esperanto ekde la komenco rekonita de ĉiuj kiel la supera lingva instanco fariĝas eĉ pli grava, ol antaŭe. Tial, la plej rigora observado de la decidoj kaj rekomendoj de la Akademio estas antaŭkondiĉo por ĉia ajn sukcesa laboro por la Internacia Lingvo. Atakoj kontraŭ la aŭtoritato de la Akademio kiel tia, aŭ misprezentoj de ĝiaj unuopaj decidoj aŭ rekomendoj aŭ atencoj al la digno kaj sciena reputacio de ĝiaj membroj, estas forte kondamnindaj kiel rekta sabotado de la laboro por la Internacia Lingvo.

5. En 60 jaroj de sia ekzistado UEA evoluis al forta internacia asocio, apartenanta tutcerte al la centoj de la plej gravaj el inter ĉ. 3000 nun ekzistantaj en la mondo. Ĝi estas rekonita

de internaciaj kaj landaj instancoj kiel reprezenta organizaĵo de la Esperanto-Movado, kaj ĝia reputacio kreskas de jaro al jaro. Tial, la tasko de ĉiuj personoj parolantaj la lingvon estas fortikigi UEA ĝis maksimumo, por ke ĝi povu kiel eble plej efike plenumi sian rolon. Kreado aŭ apogado de paralelaj organizaĵoj aŭ instancoj kun esence samaj idealoj — sed sen realecaj perspektivoj, sen la bezonataj homaj fortoj, materiaj rimedoj, reprezenta karaktero kaj adekvata prestiĝo — disrompas la fortojn, kreas konfuzon kaj, en la fina linio, malutilas al la afero mem de la Internacia Lingvo.

UEA restas juna kaj freŝa

6. Asocio reprezentanta mondan movadon kaj pretendanta universalecon en horizontala (teritoria) kaj vertikala (faka) sencoj ne povas kontentige funkcii, se ĝi ne *kunligas en sia organiza strukturo internaciecon kaj demokratecon kun la plej alta grado de efikeco*. UEA, kiu sukcese adaptis sin al la modernaj cirkonstancoj, lerte kombinas en sia nuna Statuto la tri esencajn elementojn en tiel modela maniero, ke pli taŭga apenaŭ estas imagebla. Neniu alia internacia organizaĵo, kies strukturo estas konata al mi, atingis la samon. Malgraŭ sia aĝo, UEA restas juna kaj freŝa. Ne vidi tion, signifas aŭ ignori faktojn aŭ intence misprezenti ilin. En sia nuna organiza formo UEA estas pli ol sufiĉe ampleksa por ebligi al ĉiu Esperanto-organizaĵo — ĉu landa, ĉu faka, ĉu alia — kaj al ĉiu serioza aganto por la Internacia Lingvo, esprimiĝi kaj efike kunlabori. Se io estas kritikinda, tiam certe ne la organiza strukturo de UEA sed la fakto, ke ofte oni ne scias utiligi la multnombrajn eblecojn, kiujn ĝi prezentas.

7. UEA kiel tia estas politike neŭtrala, sed tio neniel implicas, ke ĝiaj membroj estus en



KELKAJ FUNDAMENTAJ TEZOJ

(daŭrigo)

kiu ajn senco senigitaj de sia rajto havi proprajn politikajn, filozofiajn, religiajn aŭ aliajn konvinkojn. UEA ne estas, nek laŭ sia Statuto povas esti, neŭtrala koncerne kiun ajn aspekton de la lingva problemo, inkluzive la politikan, aŭ rilate kiun ajn formon de diskriminacio kaj persekutoj kontraŭ la Internacia Lingvo aŭ la Esperanto-organizaĵoj. *Strikta observado de tiel difinita principo de neŭtraleco fare de ĉiuj organoj de la Asocio kaj de ĉiuj funkciuloj, kiam ajn ili agas en la nomo de UEA, estas unu el la bazaj kondiĉoj de ĝia universaleco kaj tial ankaŭ de ĝia sukcesa laboro.*

"Suvereneco" ne aplikebla

8. UEA estas nek ŝtato, nek federacio aŭ konfederacio de ŝtatoj. Tial, apliki al ĝi, aŭ al la asocioj, el kiuj ĝi konsistas, la ideon de suvereneco, aŭ kiun ajn alian principon de ŝtata organizo, estas esence erara kaj misgvida. Same erare estas identigi ĝin al industria entrepreno aŭ komerca kompanio. *UEA estas kultura organizaĵo, libervole formita por progresigi la celojn formulitajn en la Statuto, kaj ĝi povas esti komparata nur al similaj kulturaj, senprofitaj privataj asocioj.*

Evoluigi la ekzistantajn agadojn

9. La finaj celoj kaj la aktualaj taskoj de UEA estas difinitaj en la Statuto, Regularoj kaj Laborplano. Ĝiaj nunaj agadoj konformas al la celoj kaj difinitaj konkretaj taskoj. Ili konsistas el 5 ĉefaj grupoj: (i) disvastigo de la lingvo per dokumentado kaj informado (CED, IF, IGS, KGS, diversaj specialaj kampanjoj); (ii) kontribuo al kultura riĉigo de la lingvo (ISU, IAT, Belartaj kaj Oratoraj Konkursoj, Artaj Festivaloj, Magnetofona Servo, Serio Oriento-Okcidento, propraj periodaĵoj kaj aliaj publikaĵoj, helpo al diversaj kulturaj aranĝoj); (iii) instruado (kunligo de lernejoj pere de la KKL, Lerneja Bulteno, Lernejaj Konferencoj, Internacia Ekzamena Komisiono, Graĵnoj en Vento kaj aliaj publikaĵoj); (iv) kreo kaj evoluigo de praktikaj servoj (delegita reto, fakaj asocioj, koresponda servo, fakaj konferencoj kaj seminarioj k.s.); (v) eksteraj rilatoj (Unesko, UN, rilatoj kun NRO, rilatoj de TEJO kun neesperantistaj junularaj organizaĵoj k.a.). *Konservi kaj evoluigi la nunajn agadojn, krei novajn en la kvin ĉefaj branĉoj, signifas progresigadi la lingvon; malatenti aŭ haltigi ilin signifas regreson.*



Kunlaboro inter egaluloj

10. Pro la tuta karaktero de UEA, kaj por ke ĝi povu efike plenumi siajn taskojn, ĉiuj ĝiaj partoj, ĉiuj instancoj kaj funkciuloj devas esti rigardataj kiel same gravaj por la progreso de la tuto.

La rilato "superulo-subulo" ne estas akceptebla. Ankaŭ la rilato inter la komitatoj kaj estraranoj de diversaj organizaĵoj, unuavice de UEA, unuflanke, kaj la oficejoj aŭ la unuopaj geoficistoj, aliflanke, devas esti rigardata pli kiel rilato inter kunlaborantoj, ol kiel tiu de labordonantoj kaj subuloj. Tio signifas, ke al profesiaj laborantoj en la Esperanto-organizaĵoj ne estas aplikeblaj la normoj kutime aplikataj al la oficistoj aŭ laboristoj de industriaj kaj komercaj entreprenoj, aŭ al tiuj de la ŝtato. *Malatento de tiu principo facile kondukas al burokratismo aŭ al malkonkordoj, aŭ al ambaŭ, kaj kaŭzas nur malbonon, kelkfoje neripareblan.*

Observi demokrate faritajn decidojn

11. La Statuto kaj Regularoj klare difinas la kompetentecojn de diversaj organoj kaj la manieron, laŭ kiu estas farataj la decidoj. Tiu demokrata maŝinaro ebligas ĝisfundajn diskutojn en la kompetentaj organoj pri ĉiuj proponoj kaj aliaj demandoj, sed ĝi ankaŭ postulas konsciencan plenumon de la faritaj decidoj.



La prezidanto de UEA esprimas la dankon de la kongresanoj al la magistrato de Madrid okaze de la oficiala akcepto en la parko "El Retiro". De maldekstre: s-ro Jaumotte, prof. Sancho, prof. Lapenna, d-ro Herrero, la vic-urbestro de Madrid, s-ro Wensing kaj s-ro Becker.

Pro la ofta malatentado de la kompetentecoj laŭ la Statuto kaj pro la neplenumado aŭ nur supraĵa plenumado de diversaj decidoj (kelkfoje eĉ intence en la nomo de ia imagita "suvereneco"), miloj da horoj, kiujn oni povus utiligi por pozitiva laboro, estas ĉiujare vane malŝparataj por superflua korespondado, admono, instigoj kaj petoj pri plenumo de io, kion oni estus devintaj jam delonge realigi. Ĉio ĉi, krome, kaŭzas, ke la rezultoj, kvankam rimarkindaj, tamen multe postrestas malantaŭ la faktaj eblecoj. Pro la nedisigebla kunligiteco de ĉiuj agadoj en la menciitaj kvin grupoj, la konscienca observado de la Statuto, Regularoj, Laborplano, kaj la plenumado de ĉiuj faritaj decidoj, estas ne nur postulato konforma al la celoj, pro kiuj UEA ekzistas kiel organizaĵo, sed ankaŭ afero de elementa loĝaleco ŝuldata al la kunlaborantoj en la sama aŭ aliaj instancoj.

Plenumi la akceptitajn taskojn

12. *Membreco en la Komitato, Estraro aŭ aliaj organoj ne estas ia honora ofico, sed labora funkcio. En la nuna evolustadio kaj kun la nun disponeblaj materiaj rimedoj, kiuj malebligas konsiderindan altigon de la nombro de geoficistoj kun adekvataj kvalifikoj, tiu membreco postulas ne nur aktivan partoprenon en farado de decidoj, sed ankaŭ multe da*

persona laboro por realigi ilin. Neniu devigas kiun ajn akcepti membrecon en iu organo aŭ fariĝi komisiito por iu agado, sed, se oni akceptas iun funkcion aŭ taskon, oni samtempe akceptas la moralan devon precize plenumi ĝin. Bedaŭrinde, tro ofte oni neglektas tiun devon, kio siavice kaŭzas seriozajn obstaklojn al normala disvolviĝo de la laboroj, grandan tempoperdon, plendojn kaj eĉ plene superfluaĵajn elspezojn. Sen radikala forigo de tiu manko ne estas imagebla progresado laŭ la principo: komuna decidado; individua, sendependa plenumado de la decidoj, se necese kun la helpo de la C.O., sed nepre evitante tro ŝargi ĝin per laboroj, kiuj povas esti farataj ekster la oficejo. La koncepto de ia "direktoro", kiu nur decidus kaj ordonus, sed lasus la faktan laboron plene en la manoj de granda salajrata oficista aparato, ne estas aplikebla al UEA.

Rolo de la Centra Oficejo de UEA

13. *La C.O. estas la teknika-administra bazo de la tuta laboro. Se ĝi ne funkcias glate, ĉiuj aliaj agadoj devas lami. Tial la tuta C.O. kiel kolektivo kaj ĉiu unuopa oficisto-kunlaboranto havas apartan respondecon, kiu postulas paciencon, sindonan rilaton al la laboro, akuratan kaj senprokrastan traktadon de aferoj, aktivan partoprenon en la realigo de la agadprogramoj de la Asocio. Ĝuste tio devas distingi nian oficistaron disde la burokratoj. Nur sub tiuj kondiĉoj la C.O. povas sukcese plenumi sian gravegan funkcion per la disponeblaj rimedoj por la salajroj kaj por aliaj materiaj elspezoj.*

Gvidantoj havas aldonajn devojn

14. *La laboro por la Internacia Lingvo estas nek simpla, nek facila. Ĝi postulas de ĉiuj — tute egale en kia formo aŭ en kiu medio ili aktivas — libervolan disponigon de tempo kaj energio. La personoj en gvidaj pozicioj, inkluzive la profesiajn kunlaborantojn, havas aldonajn devojn, kiuj, interalie, ofte necesigas pliajn temporabajn oferojn de intelektaj kaj fizikaj fortoj por specialaj studoj, analizoj de situacioj, planado, organizado kaj realigo de agadoj en lokaj, landaj aŭ mondaj kadroj. De la karaktero de ilia laboro grandparte dependas ne nur la atingoj aŭ malsukcesoj, sed ankaŭ la pozitiva, indiferenta aŭ negativa imago pri Esperanto en la publika opinio. Tio eksplikas, kial en kelkaj regionoj aŭ medioj la Esperanto-organizaĵoj estas respektataj kaj la agado por la Internacia Lingvo apogata aŭ sekvata kun simpatio, dum en aliaj ili estas bagateligitaj aŭ eĉ primokataj. Feliĉe, ekde Zamenhof kaj la unuaj pioniroj ĝis la hodiaŭa tago, ne mankis personoj, kiuj sur diversaj kampoj senlace dediĉis kaj plue dediĉas siajn talentojn, sciojn, juĝkapablojn kaj laborfortojn*



KELKAJ FUNDAMENTAJ TEZOJ

(daŭrigo)

al ĉiufanka progresigo de ideo, objekte apartenanta al grupeto da decide gravaj por la estonteco de la homaro. Rezulte, malgraŭ ĉiaspekaj obstakloj, ekde antaŭjuĝoj ĝis konsciaj kontraŭstaroj aŭ eĉ persekutoj, kaj praktike sen kia ajn financa helpo, la lingvo sukcese disvastiĝis tra la mondo kaj socie enradikiĝis. Malfeliĉe, ĉiam troviĝis ankaŭ individuoj, kiuj pro kompleksaj psikologiaj kaŭzoj trovis ĝuon en detruado de tio, kio jam estis pene konstruita. Preskaŭ senescepte la plej aktivaj kaj sukcesaj laborantoj fariĝis viktimoj de sengustaj atakoj, insidaj intrigoj kaj insultoj, kio kutime tiel lacigis kaj amarigis ilin, ke ili finfine komplete rezignis pri plua laboro. Centoj, eble miloj da plej valoraj homoj estis pro tio perditaj en la lastaj ok jardekoj. Ofte tiuj perdoj kaŭzis stagnojn aŭ regresojn, dum primitivismo provizore jubilis, ĝis troviĝis novaj pozitivaj fortoj, kiuj ekkomencis rekonstrui por fronti la saman sorton post kelka tempo. Tiu stranga irado en formo de du paŝoj antaŭen kaj unu paŝo malantaŭen estas unu el la pliaj kaŭzoj, laŭ mi la plej danĝera, kiuj obstaklas pli kontentigan progresadon. Sen definitiva sanigo de tiu bedaŭrinda stato ne estas eble atendi multe pli grandajn sukcesojn. La homo estas nia plej granda valoro. Necesas multe pli da respekto kaj por li kaj por lia laboro.

La vojo altrudiĝas per si mem

15. La supraj tezoj, kvankam formulitaj abstrakte, estas bazitaj sur multjaraj tre konkretaj personaj spertoj, kompletigitaj per studo de historiaj eventoj en la Esperanto-Movado antaŭ 1928. Ili montras la pozitivajn kaj negativajn flankojn de nia realaĵo. La celo estis nek laŭdi, nek riproĉi, sed indiki la irotan vojon, kies direkto altrudiĝas per si mem: flegi kaj fortikigi ĉion pozitivan, senkompatate liberiĝi de ĉiuj negativaj aspektoj.

Agi tuj kaj ĝisfunde

Ne estas tempo por prokrasti aŭ rezignacie atendi. Necesas agi tuj kaj ĝisfunde, ĉar la cirkonstancoj en la mondo rapide maturiĝas por la solvo de la lingva problemo kaj paralele kreskas la ŝancoj por ĝeneraliĝo de la uzo de Esperanto. De UEA, de ĉiuj organizaĵoj apartenantaj al ĝi, de ĉiuj unuopuloj dependas, ĉu ni scios ekspluati tiun ĉi unikan okazon, aŭ ni permesos, ke ĝi preterpasu nin. Kaj ni ĉiuj bone memoru, ke konvenaj historiaj okazoj ne kutimas ripetiĝi.

LINGVA DISKRIMINACIO EN UNUOPAJ LANDOJ

Stimulaj diskutoj en kunveno de UEA



Honorigo por prof. Lapenna

La Unua Ĝenerala Kunveno de UEA malfermiĝis, en ĉeesto de pluraj centoj da kongresanoj, per unu ero eksterprograma. Estis konvene, ke la Estraro elektis ĝuste tiun ĉi kunvenon, en kiu prof. Lapenna devis prezenti la enkondukan raporton, por honorigi publike la prezidanton je la okazo de lia 30-jara estraraneco: vere unika momento, kiel emfazis vicprezidanto Carlén. "Certe neniam," li daŭrigis, "unu sola homo signifis tiom por popola movado en la mondo, kiel Ivo Lapenna." La veraj herooj de nia mondo, li opiniis, ne estas tiuj de la batalkampo, sed tiuj, kiuj ĉion oferas por idealo. Al prof. Lapenna dankas la Estraro kaj dankas ĉiu membro de la Asocio. La donaco, kiun li transdonas al la prezidanto, neniel estas ia rekompenco — se tia, ĝi devus esti miloble pli granda — sed nur eta simbolo. "Mi estas fiera kalkuli nian prezidanton inter miaj amikoj." (Longa aplaŭdo)

Dankante, la prezidanto alvokis al ĉiuj subteni la Asocion per ĉiuj fortoj kaj certigis, ke li neniam ĉesos labori por la Internacia Lingvo.

La ĉefa parto de la kunveno, dediĉita al "Kulturaj rajtoj kaj lingva diskriminacio", estis rimarkinda pro la vervaj kaj seriozaj diskutoj kaj konkretaj kontribuoj el pluraj landoj. Estis evidente, ke, kvankam kelkaj timas la sekvojn de pli 'ataka' strategio rilate lingvan diskriminacion, la plimulto estas konvinkita pri la

praveco de la insisto pri lingva egalrajteco kaj fidas, ke la publika defendado de la homaj rajtoj povas havigi al la Asocio grandajn simpatiojn.

Lingvaj rajtoj neglektataj

En sia enkonduko prof. Lapenna memorigis, ke la laŭplana agado de UEA en la Jaro de Homaj Rajtoj estas bazita sur du faktoj: unue, ke la Statuto mem de UEA deklaras, "ke la respekto de la homrajtoj estas por ĝia laboro esenca kondiĉo"; due, ke UEA pro sia baza celo havas apartan kaŭzon por okupiĝi pri lingvaj rajtoj — des pli, ĉar aliaj organizaĵoj, inkluzive de UN kaj Unesko, preskaŭ tute neglektas ilin.

Kaj tamen, ĉiuj gravaj dokumentoj pri la Homaj Rajtoj, ekde la Charto de UN kaj la Universala Deklaracio ĝis la Konvencio pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj, tiu pri Civitanaj kaj Politikaj Rajtoj, kaj la Konvencio kaj Rekomendoj kontraŭ Diskriminacio en Edukado, ĉiuj eksplacite mencias la principon de lingva egaleco. Estas rekonitaj, interalie: la rajto de ĉiu popolo "libere decidi pri... sia kultura evoluo", la rajto uzi la propran lingvon antaŭ kortumoj, la rajto ricevi edukadon sen ia diferencigo bazita sur la lingvo, kaj la apartaj rajtoj de lingvaj malplimultoj interne de la ŝtatoj.

Prof. Lapenna skizis la diversajn formojn de lingva diskriminacio ekzistantajn sur nivelo

internacia, precipe la diskriminacio, kiun signifas la sistemo de "oficialaj" kaj "laboraj" lingvoj en UN, Unesko kaj aliaj organizaĵoj. Sed li alvokis la ĉefan atenton de la kunveno al la temo de lingva diskriminacio interne de unuopaj ŝtatoj, do sur la nivelo landa. Precipe en ŝtatoj plurnaciaj, li diris, la altrudado de unusola lingvo kiel tutŝtata, la malebleco uzi la propran lingvon en edukado, literaturo, radio, televido, antaŭ kortumoj ktp signifas lingvan diskriminacion, kiu foje atingas la amplekson de kultura genocido.

Solvo aplikata en Jugoslavio

La diskuton lanĉis d-ro Ivo Borovečki, kiu prezentis la ekzemplon de Jugoslavio kiel plurnacian ŝtaton, kiu solvas sian enlandan lingvan problemon. Kontraste kun la situacio antaŭmilita, en la nuna Jugoslavio ĉiu popolo — serboj, kroatoj, slovenoj, makedonoj, italoj k.a. — rajtas uzi sian propran lingvon por ĉiuj celoj. Pro tio, ekzemple, la Federacia Parlamento funkcias per helpo de samtempa interpretado. Nacimalplimultoj povas ricevi ĉiujn informojn (radio- kaj TV-elsendojn, ĵurnalojn, ŝtatajn dokumentojn) en sia propra lingvo, same edukadon ĝis gimnazia nivelo, reprezentigon en kortumoj ktp. Tiun situacion li kontrastigis kun tiu de landoj kiel, ekzemple, Etiopujo, kie la 10 milionoj da galloj havas neniujn lingvajn rajtojn kontraŭ la amharlingvanoj.

Prof. Lapenna difinis vidpunkton en la Unua Ĝenerala Kunveno. De maldekstre: s-ro Carlén, prof. Lapenna, d-ro Sadler, s-roj Wensing, Becker kaj Jaumotte.



Jaro de
Homaj Rajtoj

Premi registarojn

Al rimarkoj de s-ro R. Jossinet (Francujo), ke la kampanjo kontraŭ lingva diskriminacio tuŝas la sferon de politiko kaj povas esti danĝera por UEA, la prezidanto respondis, ke franco, jugoslavo, brito aŭ civitano de diversaj aliaj landoj plene rajtas laŭ la juro de la koncerna lando kritiki sian registaron; plie, Unuiĝintaj Nacioj (al kiu apartenas la menciitaj ŝtatoj) aparte petis la ne-registarajn organizaĵojn — inter ili ankaŭ UEA — fari premon, pere de siaj landaj asocioj, ke la unuopaj registaroj subskribu kaj ratifu la du Konvenciojn pri la Homaj Rajtoj.

Maleble atingi perfektan justecon

D-ro H. R. Tonkin atentigis la ĉeestantojn, ke neniam eblos komplete elimini lingvan maljustecon, pro la simpla fakto, ke iuj lingvaj grupoj estas tiel malgrandaj, ke estus maleble havigi al ili lernejojn, gazetojn ktp. en ilia propra lingvo. En Afriko kaj Azio, ekzemple, ne malofte okazas, ke vilaĝo de 100 personoj parolas tute apartan lingvon. Krome necesas ĉiam konsideri la dezirojn de la popolo mem. Iuj nacioj deziras instruadon, ekzemple, en la propra lingvo, sed ne sukcesis tion ellukti. Aliaj deziras instruadon en fremdaj lingvoj sed estas devigitaj lerni per la propra, minoritata lingvo. Diskriminacio lingva estas entute multe pli komplikita, ol ekzemple rasa.

D-ro Tonkin finis sian intervenon, rekomendante al ĉiuj, kiuj vere interesiĝas pri la problemo, serioze pristudi ĝin. Li citis la titolojn de nacilingvaj verkoj de Deutsch, Diop, Kolaski, Vildomec, Punya Sloka Ray k.a., kaj du studojn eldonitajn de Unesko.

Tria nivelo: la kazo de EEK

D-ro W. Bormann atentigis, ke inter la problemoj de unuopaj ŝtatoj, unuflanke, kaj de UN kaj Unesko, aliflanke, ekzistas tria politika strukturo kun propraj lingvaj problemoj kaj formoj de lingva diskriminacio. Temas pri organizaĵoj kiel la Eŭropa Ekonomia Komunumo, kies kampo estas tre vasta, kaj kiu tuŝas la suverenecon de la unuopaj ŝtatoj-membroj. EEK povas esti ankoraŭ laborkapabla kun 4 lingvoj, kiel nun, sed riskos panei, se ĝi plue vastiĝos.

Fine, kongresano el Hispanujo prezentis la problemon de Katalunujo, kie ankoraŭ ne ekzistas lernejoj katalunlingvaj. La rezulto de tiu malpermeso estas rapida difektado de la kataluna lingvo sub influo de la hispana. La bezono de ŝtata unueco ne devas nuligi la rajtojn de malplimultoj.

Noto: Pri tiu ĉi temo vidu ankaŭ Rezolucion 1 sur p. 126.

Diplomatoj konas bezonon, vidas solvon

La tezo, ke la lingva problemo daŭre pliakraĝas, ne trovis kontraŭulojn en Madrid. Male, diplomatoj kaj aliaj aŭtoritatuloj plurfoje esprimis plenan konscion pri la problemo kaj konstatis, ke ni vivas en 'streĉa momento en la lingva historio de la mondo'.

Diplomatoj de 10 landoj ĉeestis je dimanĉo, la 4-a de aŭgusto, la Solenan Inaŭguron de la 53-a UK. El ili kelkaj estis tiel impresitaj, ke ili revizitis la kongresejon por partopreni aliajn kunvenojn dum la kongresa semajno. La landoj estis: Aŭstrujo (ambasadoro), Danujo, Finnlando, Germanujo, Italujo, Kanado (ambasadoro), Nederlando, Norvegujo, Svisujo kaj Unuiĝinta Araba Respubliko. Tri registaroj — la belga, norvega kaj sveda — krome transdonigis salutojn al la Kongreso pere de kongresanoj.

De la Hispana Registaro ĉeestis s-ro Marcelo Fraga Iribarne (frato de la ministro pri informado) kiel reprezentanto de la ministerio

Kongresanoj ĝuas la vesperan trankvilon de la ĝardeno D. Cecilio Rodríguez, en la parko "El Retiro", kie okazis la oficiala akcepto de la magistrato. Distingeblaj en la dua vico: s-ino Emilija Lapenna kaj (dekstre) prof. Sancho-Izquierdo.



*Ĉiam impresa,
ĉiam varia, la
sinsekvo de landaj
salutoj proksimiĝas
al sia fino. Kiel
lasta, por unu
lando ankoraŭ
sen organizita
Esperanto-movado,
salutas d-ro Mishaal
el Sudano.*



de eksteraj aferoj. Bonvenigante la Kongreson, li deklaris, ke diplomatoj kiel li mem tre bone komprenas la bezonon de Esperanto en internaciaj rilatoj.

El la aliaj diplomatiaj ĉeestantoj salutis la kongresanojn, plenigantajn la du-balkonan teatron Palacio de la Música, la aŭstra ambasadoro (en la angla lingvo!), la itala 2-a sekretario (itale) kaj la ambasadoro kanada (en klara kaj neŭtrala Esperanto).

Konvene elektitaj muzikpecoj en prezento de hispana kvinteto formis paŭzon antaŭ kaj post la tradiciaj salutoj de landaj asocioj: ĉi-jare 25 aliĝintaj al UEA, 6 nealiĝintaj kaj unu lando sen organizita movado (Sudano). Aparte fortan aplaŭdon ricevis la saluto de s-ro Uśpieński (Polujo), kiu samtempe anoncis la decidon de Pola Radio elsendi estontece en Esperanto "ne plu unufoje, ankaŭ ne dufoje, sed trifoje tage". Atingis la Kongreson ankaŭ multaj salutoj telegrafaj aŭ leteraj, de organizaĵoj kaj de individuoj.

Superrigardo de la lingva problemo

La Solena Inaŭguro kulminis per la parolado de prof. Lapenna, kies dua parto estas resumita en la tezoj presitaj sur pj 118-122. Ĝia unua parto estis dediĉita al klara kaj kompleta superrigardo de la lingva problemo en la mondo. Anstataŭ simpliĝi, kiel kelkaj erare supozas, — tiel komencis la prezidanto — la lingva problemo daŭre komplikiĝas pro la baza antagonismo inter la kreskantaj bezonoj de komunikado kaj la fakto de lingvodiverseco. La historio de la lingvo-uzado en diplomatio montras senĉesan kreskadon de la nombro de lingvoj uzataj. La kosto de plurlingvismo kreskadis proporcie. Tiu daŭra akriĝado de la problemo ne povas ne puŝi la evoluon en la direkto de radikala solvo, kiel ni proponas.

La inaŭguran paroladon kronis longa stara aplaŭdado.

Lingvo-konscia vic-urbestro

Kvankam ne povis ĉeesti la Inaŭguron reprezentanto de la urbo Madrid, la magistrato kompensis per bela regalo por limigita nombro da kongresanoj en la granda parko "El Retiro". La vic-urbestro alparolis la ĉeestantojn per vortoj emfazantaj la "streĉan momenton en la lingva historio de la mondo". Li finis dirante: "Vi estas duoble bonvenaj pro la solvo, kiun vi alportas, por la lingva problemo".

Kiel jam kutime en la lastaj jaroj, akceptojn aranĝis ankaŭ nombro da ambasadoj aŭ ambasadoj: ĉi-jare almenaŭ la dana, germana kaj usona. Per tiaj aranĝoj estis eble objekte informi plurajn influhavajn personojn pri la Internacia Lingvo.

Sukcesoj de la gazetara servo

Por ĝenerala informado pri la Kongreso servis, krom la regula Kongresa Gazetara Servo sub gvido de Marinko Gjivoje, ĉefe la gazetara konferenco tuj antaŭ la Kongreso. Ĝin ĉeestis 12 ĵurnalistoj, inter kiuj kvar reprezentantoj de agentejoj kaj 3 de la naciaj radio kaj TV. La rezultoj estis kontentigaj; la televido elsendis tuj en la komenco de la Kongreso, kaj la prezidanto de UEA (eble malpli kontentige por li persone!) estis senĉese sieĝata de intervjuistoj dum la tuta semajno.

Valoras mencii — ĉar ĉiam ripetiĝas similaj demandoj — la ĉefajn punktojn, kiuj interesis la ĵurnalistojn ĉe la gazetara konferenco. (1) Kial Esperanto ne pli multe progresis? (2) Kiom da homoj parolas la lingvon? (3) De kie devenas la vortoj de Esperanto? (4) En kiuj landoj ĝi plej progresis? (5) Kiu apogas aŭ subvencias la movadon internacie? (6) Kia literaturo ekzistas en Esperanto? (7) Kion vi volas diri per 'neŭtrala' lingvo?

Infermaj fakoj — notu bone!

REZOLUCIO 1: POR LA HOMAJ RAJTOJ

La 53-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninta en Madrid de la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto 1968, kun 1800 partoprenantoj el 40 landoj, aŭdinte prelegon pri la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj kaj diskutinte en la Unua Ĝenerala Kunveno de la Kongreso raporton pri la Kulturaj Rajtoj kaj Lingva Diskriminacio,

1. **Rekomendas** al la Landaj Asocioj kaj al la Landaj Sekcioj de Fakaj Internaciaj Organizaĵoj apartenantaj al Universala Esperanto-Asocio, instigi siajn Registarojn akcepti, konforme al la respektivaj konstituciaj proceduroj, ĉiujn konvenciojn rilatantajn al la Homaj Rajtoj, por kiuj ili voĉdonis, precipe la Pakton pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj, la Pakton pri Civitanaj kaj Politikaj Rajtoj kaj la Fakultativan Protokolon al tiu Pakto.

2. **Konstatas**, ke lingva diskriminacio, nome malegala traktado de lingvoj, manifestiĝas kaj sur internacia nivelo (ekz. la laboraj lingvoj en rilato al la oficialaj, la oficialaj en rilato al ĉiuj aliaj) kaj en kadroj de diversaj ŝtatoj, precipe koncerne la lingvojn de minoritataj etnaj grupoj, kio en kelkaj kazoj atingas la formojn de kultura genocido. Kiel ĉiu alia diskriminacio, ankaŭ la lingva esprimiĝas ĉefe en du formoj: objektiva (kaŭzita de la fakto mem de multlingveco) kaj subjektiva (antaŭjuĝoj pri la diskriminaciaj lingvoj kaj pri la kulturaj valoroj kreitaj en ili).

3. **Esprimas sian konvinkon**, ke la lingva problemo en la hodiaŭa mondo, inkluzive la traktatan aspekton de tiu problemo, povas esti efike kaj juste solvita nur per adekvata adopto de la Internacia Lingvo (Esperanto).

4. **Petas** la Centron de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (London-Rotterdam) dediĉi apartan atenton al la lingva diskriminacio kaj publikigi dokumentojn, studojn kaj artikolojn pri tiu demando.

5. **Komisias** la Estraron de Universala Esperanto-Asocio vaste diskonigi tiun ĉi Rezolucion kaj komuniki ĝin al U.N., U.N.E.S.C.O. kaj aliaj internaciaj institucioj, kiel ankaŭ al la Ŝtatoj-Membroj de U.N. kaj U.N.E.S.C.O. kun peto pri konsidero de ĝia enhavo.

REZOLUCIO 2: ESPERANTO KAJ TURISMO

La 53-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninta en Madrid de la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto 1968, kun 1800 partoprenantoj el 40 landoj, aŭdis Raporton de la estrarano de UEA pri turismo pri la situacio de Esperanto sur la kampo de turismo.

La Raporto, bazita grandparte sur la rezultoj de la Enketo farita laŭ la decido de la Konsilantaro de la Internacia Akademio de Turismo, klare montras la jam grandan praktikan aplikadon de Esperanto por turismaj celoj.

Preskaŭ 700 turismaj organizaĵoj tra la tuta mondo jam praktike utiligas la Internacian Lingvon Esperanto eldonante broŝurojn aŭ prospektojn; ŝtataj oficejoj de pluraj landoj jam eldonis Esperanto-filmojn por la propagando de sia landa turismo; radio-stacioj de 19 landoj faris — en 1967 — pli ol 2000 elsendojn en Esperanto por disaŭdigi interalie turismajn novaĵojn; U.N.E.S.C.O., la organizaĵo por Edukado, Scienco kaj Kulturo de U.N., rekonis Esperanton kiel gravan rimedon por kulturaj interŝanĝoj; la fervojaj administracioj de Aŭstrujo, Hungarujo, Polujo, Germanujo, Hispanujo, Finnlando, Italujo, Svislando kaj Jugoslavio utiligas Esperanton por horaroj kaj aliaj praktikaj celoj; 3500 delegitoj de Universala Esperanto-Asocio en 63 landoj disponigas siajn servojn ankaŭ por turismaj celoj.

Sekve, la Kongreso varme aprobas la Enketon faritan de la Internacia Akademio de Turismo kaj aliĝas al la deziro esprimita de tiom da Fakaj Organizaĵoj, ke la Faka Vortaro de Turismo, en kompetenta eldono de la Akademio, estu pliriĉigita per Esperanto-traduko.

La Kongreso esprimas sian altan estimon kaj profundan simpatian al la Akademio, kiu akcelas la pacon per kultura kaj kulturata turismo, same kiel Universala Esperanto-Asocio realigas, interalie, ankaŭ tiun celon per la Internacia Lingvo, kiu ebligas proksimiĝon de la popoloj, prezentante al ĉiuj homoj de bona volo la eblecon por pli bona interkompreniĝo.

*Por la 53-a Universala Kongreso de Esperanto,
La Prezidantaro:*

*Prof. d-ro Ivo Lapenna, Direktoro E. L. M. Wensing, Direktoro E. Carlén,
S-ro G. Becker, Prof. d-ro M. Sancho-Izquierdo.*

Madrid, la 10an de aŭgusto 1968

VIGLA, VARIA SOMERA UNIVERSITATO



Rektoro de ISU:
prof. Sancho-
Izquierdo

La 21-an Sesion de la postmilita Internacia Somera Universitato trafis malsano kaj politiko: ne povis ĉeesti prof. d-ro Bokarev el Moskvo (pro operacio, feliĉe sukcesa), nek ambasadoro Ralph Harry el Aŭstralio, kiun la devoj de lia profesio transportis de Eŭropo al Sajgono. Malgraŭ tiuj neantaŭviditaj mankoj, estis eble okazigi plenan sesion el 8 prelegoj de profesoroj el 8 landoj, kiuj plejparte ligis siajn temojn en la kadron de la 4-a Internacia Arta Festivalo. Sub la diligenta rektoreco de prof. Sancho-Izquierdo, la prelegojn ĉeestis meze 100-300 kongresanoj.

La Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj

En Kongreso pri la Homaj Rajtoj estis nature, ke la unuan lokon okupis prelego pri la Universala Deklaracio, kaj ke faris ĝin prof. Lapenna, kies sindediĉo al la afero de homaj rajtoj estas proverba. Lian prelegon la Estraro de UEA deklaris baza enkonduko por la diskuto en la 1-a Ĝenerala Kunveno.

Prof. Lapenna unue skizis la historion de la eventoj, kiuj kondukis al la Universala Deklaracio: la diversajn rajtojn jam frue enskribitajn en la konstituciojn de unuopaj ŝtatoj; la Atlantikan Ĉarton (1941 — ĝi menciis specife ankaŭ lingvajn rajtojn); la Ĉarton de UN; la Konvencion pri Genocido. Poste li analizis la strukturon kaj unuopajn artikolojn de la U.D. laŭ la tri ĉefaj grupoj: civitanaj kaj politikaj rajtoj, ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj rajtoj, kaj trie la artikoloj t.n. 'tegmentaj'. La preleganto kondukis per fortaj argumentoj pri la morala valoro kaj jura karaktero de la U.D. al konsidero pri la ekzistantaj rimedoj por efektivigo de la rajtoj priskribitaj.

El entute 16 diversaj konvencioj akceptitaj en tiu ĉi sfero de UN kaj ĝiaj organizaĵoj, la plej gravaj estas du internaciaj Konvencioj akceptitaj antaŭnelonge (en 1966): unu pri la Civitanaj kaj Politikaj Rajtoj, la alia pri la Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj. Tiujn ĉi ambaŭ akceptis la Ĝenerala Asembleo; subskribis ilin (kio ne estas jure deviga) nur kelkaj ŝtatoj; ratifis ilin ankoraŭ neniun ŝtato! Aldone al la unue nomita Konvencio ekzistas ankaŭ Fakultativa Protokolo, kiu donas etan eblecon al individuoj plendi al internacia instanco kontraŭ sia propra ŝtato. Sed eĉ tiu eta ebleco ankoraŭ atendas sian validigon.

Konforme al la peto de Unuiĝintaj Nacioj, ni faru premon al la registaroj de niaj propraj landoj ratifi almenaŭ tiujn el la konvencioj, por kiuj ili mem voĉdonis al la Ĝenerala Asembleo.

Prof. Lapenna finis sian prelegon per konvena citaĵo el la vortoj de Robert Kennedy: "Iuj vidas la aferojn tiaj, kiaj ili estas, kaj demandas: Kial? Mi revas pri aferoj, kiuj neniam estis, kaj demandas: Kial ne?"

Tri prelegoj pri literaturo kaj arto: interŝanĝo de kulturaj valoroj

Pri pli pure artaj temoj prelegis d-ro Humphrey Tonkin (Usono), prof. Gaston Waringhien (Francujo) kaj s-ro Lajos Lesznai (Hungarujo). Tiel d-ro Tonkin, kiu esploris la teorion, praktikon kaj intelektan fonon de angla renesanca poezio, kiel ankaŭ prof. Waringhien, kiu sekvis la sorton de hispanaj temoj tra la historio de la franca teatro, sukcesis doni al siaj prelegoj apartan hispanan guston. S-ro Lesznai, aliflanke, klopodis spuri, helpe de abundaj sonbendaj ekzemploj, la plej pure hungarajn kreaĵojn sur la kampo de la popolkanto. Lian prelegon oni povas rigardi kiel aparte valoran kontribuon al la reciproka studo kaj aprezo de kulturoj, ĉar, kiel li mem atentigis, la vera hungara popolmuziko estas preskaŭ komplete nekonata en aliaj landoj.

Prelegoj lingvistika, historia kaj natursciencaj

Grandan interesigon kaŭzis la lingvistika prelego de prof. Régulo-Pérez pri "La fajfa lingvo de La Gomera (Kanariaj Insuloj)". Temas pri unika komunika sistemo evoluigita de la insulanoj apud sia normala parolmaniero (dialekto de la hispana). S-ino Clelia Conterno (Italujo) elektis por sia prelego historian temon: "Maria Ludovika Gonzaga; Amoj, geedziĝoj kaj politiko de 17-a jarcenta princino".

El orienta Eŭropo venis du natursciencaj kontribuoj al la ĉi-jara ISU. La elstara bulgara sciencisto Vasil Peevski priskribis la ekzaktajn metodojn, i.a. aerofotogrametriajn, nuntempe aplikatajn por la kreado de mapoj. Prof. Oton Pancer (Jugoslavio) kompletigis la programon per prelego pledanta por pli racia uzado de naturaj faktoroj en agrikulturo kaj hortikulturo: pli efika adapto de la kulturspecoj al la naturaj cirkonstancoj.

KONKURSOJ MALKOVRIS NOVAJN TALENTOJN



Pluraj novaj talentoj ekaperis en la konkursoj de UEA – tiel la Belarta kiel ankaŭ la Oratora. En la fako de originala poezio, ekzemple, neniu antaŭe premiita verkisto atingis eĉ mencion. Ankoraŭ pli bonvena estas malkovriĝo de novaj oratoraj talentoj inter aktivuloj de TEJO, kio aŭguras bone por la gvidado de la Junulara Sekcio de UEA. En la Belartaj Konkursoj la suma nombro de premiitoj ĝis inkluzive la ĉi-jaran Konkurson altiĝis ĝis 84 (el 23 landoj). Apartan mencion meritas la poemo "Bedaŭrinde", en kiu sesdekjarulino memoras sian dudekjarecon. Ĝi gajnis por Mira Andrusiewicz el Polujo la titolon de "Nova Talento 1968". Sia nomo aldoniĝas al la listo engravurita sur la impona pokalo Harabaĝiu (bildo). Ĉiuj premiitoj ricevas krom diplomo ankaŭ monpremio: 100 gld. por 1-a premio; 70 gld. por 2-a kaj "Nova Talento"; 40 gld. por 3-a premio.

La kunvenon pri la 19-a Belarta Konkurso prezidis la juĝkomisiona prezidanto, prof. Waringhien. Raportis la sekretariino de la Belartaj Konkursoj, s-ino E. Lapenna. Ŝi anoncis, ke la komisionoj (por la poezio: s-roj Auld kaj Lukaŝ kaj s-ino Conterno; por la prozo: s-roj Bernard, Rosbach kaj Venture) prijuĝis ĉi-jare 111 kontribuojn de 38 aŭtoroj el 18 landoj — laŭnombra kresko de 25 % super la pasinta jaro.

La proklamon de la rezultoj sekvis deklamado de la ĉefaj premiitaj verkoj. S-ro Gabriel Mora-i-Arana, premiita poeto ankaŭ en la kataluna lingvo, emociis la ĉeestantojn per elokventa prezento de la propraj verkoj "Tri nudaĵoj de Modigliani". Emociis ankaŭ la tipe lirika kaj riĉlingva "Morto de la poeto", novelo de Andreo Szabó, kiun prezentis s-ino Lapenna. Tre aktualaj impresis ĝiaj pensoj je la temo "Kiam la homo envere mortas?"

Por la Oratora Konkurso prezentis sin ĉi-jare 5 kandidatoj. Kiel kutime, ilia tasko estis: retoriki dum 10 minutoj pri unu aŭ alia el la preskribitaj temoj, sub la severaj rigardo kaj aŭskulto de la juĝkomisiono — Francisko Simonnet, Humphrey Tonkin kaj la prezidanto Ivo Osibov.

La malfacilecon de la juĝado jam anoncis al la publiko la viglaj sed perpleksaj gestoj de s-roj Simonnet, Tonkin kaj Osibov, antaŭ ol la prezidanto anoncis, ke pro la preskaŭ egala nivelo de la konkursantoj necesis analizi tre detale la diversajn kriteriojn. La fina elekto favoris d-ron Hans-Michael Maitzen, la novan prezidanton de TEJO, kiu laŭ la temo "Ĉiuj homoj estas denaske liberaj kaj egalaj laŭ digno kaj rajtoj" analizis la antagonismon inter egaleco kaj libereco. Lia nomo estos enskribita sur la pokalo Ivo Lapenna.

BELARTAJ KONKURSOJ: REZULTOJ

Originala poezio

1. Nicolino Rossi (Italujo): "Lampiroj".
2. Gabriel Mora-i-Arana (Hispanujo): "Tri nudaĵoj de Modigliani".
3. Nicolino Rossi (Italujo): "Okuloj viaj".

Laŭda mencio:

4. Gabriel Mora-i-Arana (Hispanujo): "Esperanto".

Tradukita poezio

1. Leopold H. Knoedt (Brazilo): "La korvo" de E. A. Poe.
2. Carmel Mallia (Malto): "Speguloj" de Ruzar Briffa.

3. Sylla Chaves (Brazilo): "Himno" de Aranjó Jorge.

Laŭda mencio:

4. Sylla Chaves (Brazilo): "Destino" de Cecilia Meireles.

Originala prozo

1. Andreo Szabó (Hungarujo): "Morto de la poeto".
2. Tibor Sekelj (Jugoslavujo): "Elasta koro".
3. Mihail Sekerĝiev (Bulgarujo): "Maria".

Originala dramo

- 1-3. Ne aljuĝitaj.

Laŭda mencio:

4. Vilmos Benczik (Hungarujo): "Eva", radio-dialogo.

Nova talento (Pokalo Harabaĝiu)

Mira Andrusiewicz (Polujo) pro originala poemo "Bedaŭrinde".

Foto-konkurso

- 1-3. Ne aljuĝitaj.

ORATORA KONKURSO: REZULTOJ

1. Hans-Michael Maitzen (Aŭstrujo).
2. David Kelso (Britujo).
3. Robert Lloancy (Francujo).

AŬTORO DE LA JARO (Arĝenta Sprono de KOKO)

Victor Sadler (Nederlando) pro la poemaro "Memkritiko".

Dekstre: la unua-premiitoj Rossi, Knoedt kaj Szabó (de supre).



Internacia Arta Teatro, kiu festas ĉi-jare sian dekjaran datrevenon, prezentis entute sep teatraĵojn en Madrid. Ĉiuj pecoj — ses tradukitaj kaj unu originala — aperis en la kadro de la 4-a Internacia Arta Festivalo. Luktante, kiel preskaŭ ĉiam ili devas, kontraŭ la grandaj materialaj problemoj, kiujn levas nekonataj teatroj kaj alilingvaj teknikistoj, la membroj de IAT povis registri en sian 'bilancon' kelkajn klarajn sukcesojn, dum aliaj pecoj tamen ne povis entuziasmiĝi.

La trupo enprogramigis por la 'Oficiala' vespero ŝercan monologon "Malfacila elekto", tragikomedion "Bela indiferentulo" de Jean Cocteau kaj komedion de Branislav Nuŝić: "Analfabeto". La 'Libervola' vespero (ĉi-jare pli bonkvanta publiko, ol en kelkaj antaŭaj kongresoj) konsistis el "Taso da kafo", monologo de Ivan Cankar, "Homo kun la floro enbuŝe" de Pirandello kaj t.n. karnavala am-ludo de Miroslav Krleža: "Maskerado". La originalaĵo de Marjorie Boulton, "Maneken-parado", enkadriĝis en la Varia Arta Vespero.

La sprita teatro de Marjorie Boulton

Guste tiu groteska "Maneken-parado", kiu proponas al la publiko diversajn fantaziajn 'kongres-kostumojn', eble plej elvokis la simpatiojn de la ĉeestantoj. La kaŭzo ne estas mistero: ĝi estas sprita kompilaĵo, kun esence

teatreca karaktero, kaj enhavo, kiun la spektantoj de kiu ajn nacio povis rekte rilatigi al si mem.

Tion ne eblas diri pri "Bela indiferentulo", nek pri "Maskerado": du verkoj, kiuj esploras sen aparta originaleco amrilatojn nur tro konatajn. "Bela indiferentulo" surprizis nin nur per tio, ke ĝia aŭtoro estas la glora Cocteau. Forlasita edzino atendas frumatene la revenon de sia edzo-diboĉulo. Li revenas kaj eklegas ĵurnalon. Longe ŝi superŝutas lin per ironio kaj riproĉoj, ĝis fine, ne povante plu elteni lian silenton, ŝi forŝiras la ĵurnalon kaj trovas lin — dormanta. Jana Ravŝelj, kiu videble ne sukcesis tute kredi sian rolon, troviĝis en dilemo: kiel paroli sufiĉe laŭte por la publiko, kaj tamen ne tiel laŭte, ke fariĝus absurda la dormado de la edzo? Eĉ la bona akustiko de la Teatro de la Zarzuela ne povis tute solvi tion.

Banala triangulo

La karnavaleca "Maskerado" prezentis al ni la banalan eternan triangulon: la juna Kolombina (Ingeborg Kovaĉičević) amludis kun sia Pieroto (Jure Lipovac) rekte sub la nazo de la konscie kokrata edzo Don Kiŝoto (Srdjan Flego), pro kies artifiko ŝi ekkonscias, ke li signifas por ŝi pli, ol la junulo. Nenio, kio ne estus antaŭdirebla. La pecon savis la simpatio, kiun Flego sukcesis varbi por sia rolulo, kaj

Teatraj vesperoj

I.A.T. 10-jara

Raportis: la redaktoro

la konvinke kapricaj emocioj de Kolombina Kovaĉičević.

Ambaŭ vesperojn inaŭguris monologo de Flego. "Malfacila elekto" turmentis la dandan junulon, kiu eĉ devis telefone konsultadi amikojn por elekti al si kravatton el sia vasta kolekto. La problemon ŝajne solvos telefona sciigo pri la morto de unu el tiuj amikoj. Do nigran kravatton; jes, sed kiun el la nigraj?

Srdjan Flego sukcesis eltiri el ĉio ĉi kelkajn ridojn, sed li ne tiel regis sian rolon, ke povus libere disvolviĝi lia nature efekta gestado. Pli impresa estis la tute statika "Taso da kafo", en kiu mezaĝulo suferas konscienciproĉojn el la juneco. Nepre pli bona prezento, ol la pasintjara en Rotterdam.

Simpatia "Analfabeto" de Nuŝić

La Esperanta eldono de "Analfabeto" estas jam de multaj jaroj aĉetebla. Provinca distriktestro (Jure Lipovac) ricevas ministerian telegramon: "Bonvolu kiel eble plej baldaŭ sciigi, ĉu vi havas en via distrikto kaj kiom da analfabetoj". La tuta komedio fontas, kompreneble, el la fakto, ke 'analfabeto' ne troviĝas en la limigita vortprovizo de la distriktestro. En sia aktorado, kiel en sia kostumo, Jure Lipovac memorigis nin forte pri la rolo de poeto-oficiro en la pasintjara "Batalo ĉe Kazan". Bone subtenis lin la same senvortaraj

oficistoj: Vlado Kovaĉić kaj (precipe) Mladen Serment.

La laste menciita aktoro ĉefrolis en la dramo "Homo kun la floro enbuŝe". La "floro" estas buŝa kancero, mortiga post kelkaj monatoj. Sed sur tiu temo Pirandello konstruis nur tre abstraktan psikologian analizon, kiu disvolviĝas per nokta konversacio en kafejo. Da agado praktike neniom. Esence ankaŭ tiu ĉi verko estas monologa. Por internacia publiko, por prezentoj sub ĝenaj teknikaj kondiĉoj, necesus elekti teatraĵojn kun pli vigla agado, al kiu la publika interesiĝo povas rekte sin alkrōi.

Kompato — kaj envio!

Ĉu malebla postulo? Evidente ne, ĉar IAT ja sukcesis ĝin plenumi plurfoje en sia dekjara historio. La varma aplaŭdo okaze de la transdono al IAT de speciale farita jubilea flago, donace de UEA, estis rekono de tiu fakto. Por fini jen komento de profesia kolego Nikolaj Rytjkov al Srdjan Flego: "Mi kompatis — kaj envias!" Efektive, oni povas kompatis trupon, kiu ĉiujare preparas ĉiujn rolojn por unu sola prezento kaj ekvojaĝas nesciante, kiajn problemojn ĝi frontos en la kongresa urbo. Kaj oni povas ankaŭ envii tiujn, kiuj havas tian unikan ŝancon krei vivan teatron en la Internacia Lingvo antaŭ publiko unike internacia.

ARTA VESPERO KAJ MUZIKAJ EROJ

Per la arto de IAT ne jam finiĝis la teatra fako de la Arta Festivalo. Eĉ se li renkontis la samajn kompatigajn teknikajn problemojn, Nikolaj Rytjkov ne bezonis tro envii, ĉar ankaŭ li havis okazon eksciti kaj emocii sian internacian publikon. En la kadro de "Varia Arta Vesperto" li recitalis omaĝe al Maksim Gorkij (n. 1868) — amiko de Esperanto, kiel Rytjkov aŭdigis per ampleksaj citaĵoj el lia kompleta verkaro. Du monologoj el dramo de Gorkij transformis la aktoron en filozofieman kamparanon kun 'djuinda dialjekto'. La recitalo kulminis per "poemo en prozo" de Aleksandr Solĵenicyn, "Anasido".

S-ro Roland Dupuis estas preskaŭ konstanta kontribuanto al la kongresaj programoj, kaj lia fortepiana arto formis unu kolonon de la Arta Festivalo. Ne nur li kontribuis "Internacian muzikbukedon" al la Varia Arta Vesperto, sed lia trifoje prezentita "Festa tago en

Parizo" — tute aparta speco de kompilaĵo kultura-distra el diapozitivoj, pianludo kaj rakontoj historiaj-turismaj — estis tre aprezata.

Kantoj gajaj kaj tristaj

Po dufoje sursceniĝis en la Varia Arta Vesperto la kantistinoj Ramona van Dalsem (kun la konata akompanantino Toos Schoonman) kaj Sirkka Lehtivaara (akompane de Roland Dupuis). Granda estis la kontrasto inter la gajaj originalaĵoj de s-ino van Dalsem, unuflanke, kaj la plejparte tristaj finnaj kantoj tradukitaj, kiujn s-ino Lehtivaara aŭdigis. En la popolkantoj, kiel ankaŭ en komponaĵoj de Sibelius kaj Merikanto, oni jam povis antaŭsenti la etoson de la kongreslando 1969. Ambaŭ kantistinoj, ĉiu en sia stilo, atingis altan muzikan nivelon.



Ĥoro Zaragoza: Recenzas Lajos Lesznai (Budapest)

Dufoje en la sama vespero la Ĥoro Zaragoza prezentis al la kongresanoj "Eksterordinaran koncerton de popolaj kantoj" en Esperanto. La dirigento, majstro José Borobia, vere mastris la kantistojn.

La programo enhavis, escepte de tri komponaĵoj, nur adaptitajn verkojn. Tio estas tre bedaŭrinda, ĉar ekzistas ja tre multaj eminentaj verkoj antikvaj kaj nuntempaj de elstaraj hispanaj komponistoj. Per kelkaj verkoj el la 16-a kaj 17-a jarcentoj la gvidanto pruvis, kion li povus doni al la publiko, se li elektus aliajn verkojn de bonaj hispanaj komponistoj.

La publiko akceptis favore la prezentojn, kaj la ĉirkaŭ 50-persona ensemblo ja meritis la aplaŭdojn, precipe majstro Borobia, kiu gvidis la tutan programon sen partituro — aparte rimarkinda fakto. Mi estas certa, ke per elekto de klasikaj hispanaj originalaj komponaĵoj la Ĥoro Zaragoza atingus bonan sukceson ekster Hispanujo.

„NI JAM POVAS FARI EFIKAN PREMON”

La Solena Fermo

Jam nun niaj membroj estas sufiĉe multaj, por ke UEA formu gravan kaj efikan 'premgrupon' je la publikaj instancoj kaj la publika opinio — kondiĉe, ke ni laboras unuece. Sed la efiko estus multe pli granda, se ni povus atingi minimume 10 000 individuajn membrojn.

Solida financa fortikigo de UEA

Tiaj estis la konkludaj vortoj de la prezidanto kaj samtempe la konkludo de la 53-a Universala Kongreso. La Solena Fermo, kiu kunigis ĉirkaŭ 700 kongresanojn, komenciĝis per mallonga silento omaĝe al la forpasinta honora prezidanto, s-ro Kürsteiner. Post ĝenerala superrigardo de la kongresaj laboroj fare de la ĝenerala sekretario (vidu la resumon sur p. 117), la prezidanto transdonis florojn al la nova honora membro, f-ino Vermaas. Estis ŝia ideo kaj iniciato, li emfazis, la Kapitalo Hodler 68 — la ideo, ke ni vivigu la nomon Hodler en ĉi tiu 60-a jaro de UEA per solida financa fortikigo de la Asocio. "Se estos atingita la celata sumo de 500 000 gld. antaŭ la Kongreso en Helsinki, tiam la ĝenerala sekretario povos tie anonci lanĉon de novaj agadoj."

La voĉlegitajn rezoluciojn (vidu p. 126) la Kongreso tiam akceptis: Rezolucio 1 per ĉiuj voĉoj escepte de unu kontraŭa, Rezolucio 2 unuanime.

Novaj estraranoj de TEJO

Raporton pri la Internacia Junulara Kongreso de TEJO en Tarragona prezentis la nova prezidanto de TEJO, d-ro Maitzen. (Detale raportos "La Juna Vivo" en oktobro). Ĝian Estraron krome eniris A. Grzębowski, I. Carlsson, M. Dobrzyński kaj R. Lloancy, kiu fariĝis nova redaktoro de "La Juna Vivo".

La konkurs-rezultojn anoncis prof. Waringhien kaj s-ro Osibov por la belarta kaj oratora

respektive. Persone ĉeestis, kaj do povis mem transpreni la diplomojn, Gabriel Mora i Arana, Tibor Sekelj, Hans-Michael Maitzen kaj V. Sadler. Venis la momento de la dankoj: al LKK, al KKS Pompilio, "ĉiam afabla, ĉiam ĝentila", al la kontribuintoj al la Arta Festivalo, al la prelegintoj de ISU, al s-ro Gjivoje, kies Kongresa Gazetara Servo ebligas al ni "rompi la ŝelon de izoliteco", fine al ĉiuj helpintoj. Ankoraŭ ne finiĝis la dankoj, tamen: nome de Pola Esperanto-Asocio s-ro Kosieniak aparte esprimis per donacoj dankon al Hispana Esperanto-Federacio — ankoraŭfoja pruvo, kiel rimarkis la prezidanto, pri la universaleco de UEA senkonsidere pri politikaj strukturoj.

Fulmfrapita flago

Per la solena transdono de la Kongresa flago al finna reprezentanto la lastaj momentoj de la 53-a UK forpasis en la akra lumo de multopaj foto-fulmoj.

La dua Kunveno de UEA

La 2-a Ĝenerala Kunveno de UEA, laŭ la multjara tradicio, donis okazon al la membroj pridemandi kaj diskuti en ĉeesto de la Estraro la Estraran Raporton pri 1967-68.

Se menciis almenaŭ kelkajn punktojn: La prezidanto klarigis la nunan staton de la agado ĉe UN kaj Unesko; la premon, ke UN komunuiku la Proponon de UEA al la Ŝtatoj-Membroj, oni provizore ĉesigis por ne malhelpi eventuale la aktualan agadon ĉe Unesko. Pri IOE la ĝenerala opinio estis negativa. Kiel diris s-ro Aleksiev, ne vidiĝas en ĝia agado io ajn, kio ne povus okazi en la kadro de UEA. Tial Bulgara Esperanto-Asocio ne subtenas IOE.

La dua parto de la kunveno konsistis el koncizaj raportoj pri la dumkongresaj laboroj de fakaj k.a. organizaĵoj, el kiuj almenaŭ 20 okazigis minimume po 1 kunveno. Raportoj aperos en la koncernaj fakaj organoj.

M. H. Vermaas: nova Honora Membro

F-ino M. H. Vermaas, kiu antaŭ nelonge retiriĝis en sia funkcio de direktorino de la Centra Oficejo de UEA en Rotterdam, komencis lerni la Internacian Lingvon en 1934. Ke ŝi mastras kaj majstras la lingvon, tion abunde pruvis la multaj artikoloj kaj tradukoj, kiujn ŝi aperigis en diversaj periodaĵoj kaj libroj. Ankaŭ da prelegoj ŝi faris tre multe. Ŝi estis kaj restas ĉiam aktiva en la loka kaj landa movado: dum multaj jaroj sekretariino de loka grupo kaj komitatano de LEEN. Sur internacia kampo: ŝi estis estrarano de Universala Ligo ekde la fondo ĝis hodiaŭ, kaj en 1953 ŝi estis elektita komitatano C de UEA. En la krizo de 1955, kiam UEA ŝanĝis la sidejon, f-ino Vermaas estis nomita direktorino de la C.O., kaj ŝia sindono, apogita de kelkaj volontuloj, ebligis venki la krizon. Ŝiaj laborkapablo kaj lojaleco al la Asocio estas monde konataj.



Senrubrikaj notoj el la kvindek-tria

Kongresanoj venis el 38 landoj: grandnombre el Jugoslavio (eĉ pli, ol da hispanoj), sed ankaŭ el aliaj orient-eŭropaj landoj. Soveta Unio sendis 2-personan delegacion. La kanada registaro bonvolis, unufoje, sendi siakoste plurajn gejunulojn. Rimarkeblis ankaŭ japanoj, afrikanoj, araboj...

La dokumentujo prezentis al ili amason da turismaj materialoj kun Esperanta traduko, du gramofondiskojn de hispanaj kantoj, la suplementon de la Kongresa Libro ktp. (La Kongresan Libron oni ricevis komence de julio — ĉ. 110 paĝoj da informoj, bildoj, utila frazaro Esperanta-hispana k.s.).

Funkciis servoj kasa, dokumenta, informa, memoraĵa (madridaj poŝtkartoj kun Esperanta teksto, specialaj kongreskovertoj), poŝta, loĝiga, korespondaja, ekskursaj, fota, krom oficejo de Hispana Esperanto-Federacio, budoj de IAT, de la 54-a en Helsinki, de la postkongreso (en Zaragoza) kaj, eble la plej uzata, la libroservo de UEA, kie sola laboradis tuttempe la ŝajne dekbraka f-ino Vermaas. Plej vendataj, ŝi diris, estis la poŝtvortaroj Sopena kaj la popularaj diskaj.



icia fiero en Madrid: la Oficiala Balo

Por interkonatiĝo servis (evidente) la Interkona Vespero (en ne tre taŭga ejo), sed ankaŭ la Oficiala Balo, la Bankedo (280 kontentaj klientoj), la Junulara Vespero kaj la tre sukcesintaj ekskursoj, kiujn partoprenis kune eble 700 personoj.

Distris la kongresanojn filmoprezentoj de FIAT, la pli amuzaj eraretoj de organizo, kaj la neelĉerpeble babilemaj taksiistoj.

La infanojn, kiujn la nuligo de la Infana Kongreseto lasis senokupaj, oni sukcesis tamen kunvenigi 20-oje por ĉiutagaj lecionoj, ekskursetoj kaj ludoj.

Intervjuo kun kongresano

Por larĝigi iom nian superrigardon de la 53a, ni petis la impresojn de s-ro Francisko Simonnet, el Francujo.

Red.: Ĉu vi antaŭe vizitis iun Kongreson?

Simonnet: Plurajn - Sofio, Hago, Budapeŝto, Rotterdamo, kaj la Eŭropan en Vieno 1965.

Red.: Ĉu bona la organiza flanko ĉi-jare?

Simonnet: Mi ne spertis iun vere gravan mankon, sed la kutimaj fuŝetoj, kiuj estas fakte neeviteblaj kaj tial pardoneblaj, estis iomete pli multaj; ĝenis kelkaj mankoj en la servoj kaj tro da programŝanĝoj.

Red.: Kio plej favore impresis?

Simonnet: La Komitato rapide kaj efike laboris. La Oratora Konkurso (mi estis ano de la juĝkomisiono) estis sur tre kontentiga nivelo: nur kun granda peno ni povis elekti la venkinton.

Red.: Kaj la Kongresejo?

Simonnet: Impona konstruaĵo, kun taŭgaj ĉambroj. La grandeco de la ĉambroj ne ĉiam kongruis kun tiu de la publiko. La ĝiĉeta koridoro estis tro mallarĝa. — Sed finfine la domo ne servas nur por kongresoj. Gravaj avantaĝoj estis la bona restoracio kaj bona situo, tre proksime al El Prado kaj al parko.

Red.: Ĉu la programo kontentigis vin?

Simonnet: Ĝi estis iom malpli densa, ol en antaŭaj jaroj — precipe se oni konsideras, ke ĝi enkadrigis Artan Festivalon. Necesis iom pli da programeroj; oni ja ĉiam povas rezigni pri unu aŭ alia, se ili okazas samtempe.


Red.: Kiel vi trovis la urbon Madridon?

Simonnet: Tre agrabla, tre 'urbeca' urbo, taŭga por kongresoj. Oni estas tuj kaptita de ĝia etoso. Feliĉe la varmo ne estis tia, kian oni timis.

Red.: Ĉu vi havas ankoraŭ rimarkon?

Simonnet: Jes: estas mirige, kiel, malgraŭ kutimiĝo al la formo de la Kongresoj, oni estas ĉiam denove impresita. Eĉ se oni jam dekfoje aŭdis la sinsekvon da salutparoladoj en la Inaŭguro, oni tamen lasas sin kapti de la unika etoso.

Red.: Konsentite — kaj dankon!



F. Simonnet

Dum la Kongresa periodo aperis...

12 (dek du!) novaj tradukoj el verkoj de Maŭ zedong. De la sama eldonejo venis ankaŭ 88-paĝa grandformata albumo "Rentkolekta korto; Argila statuaro". Al la fervojista literaturo aldoniĝis "Internacia konvencio pri la fervoja vartrafiko", eldonita en Jugoslavio. (La konvencion pri pasaĝer- kaj pakaj-trafiko ni recenzis en junio.) Nova ilustrita broŝuro el Budapeŝt, "Sciindaĵoj pri Hungarujo", kostas 0,30 gld.

Lerniloj araba kaj hebrea

Lige kun la vigliĝo de la movado en proksima Oriento aperis la unua vortaro Esperanta-araba (vidu anoncon sur la lasta kovrilpaĝo) kaj, preskaŭ samtempe, nova lernilo por Israelanoj: "Esperanto, Dulingva lernolibro por memlernado", 100-paĝa verko de Dvora Ŝor. Kiel aparta broŝureto nestas en ĝia kovrilo ankaŭ vortareto Esperanta-hebrea. Kiu uzas la rektametodan instruilon "La teksto unua", certe bonvenigos ĝian daŭrigon "La teksto dua", ĵus alveninta el Oosaka. Prezo indikita: 80 enoj.

Okaze de la 20-a Kongreso de IFEF en Varna kaj de la Teknika Konferenco de ISAE en Budapeŝt aperis aro da multobligitaj fakaj studoj kaj teknikaj prospektoj fervojaj kaj elektroteknikaj.

Disko-merkato vigliĝas

En la Jarlibro de UEA, kiel fak-delegiton en Antverpeno, oni trovas "Jo Haazen, karilono". Jo Haazen ne estas ordinara karilono. La 24-jara muzikisto plurfoje venkis en internaciaj karilon-konkursoj. Lian arton oni povas nun aŭskulti per disko stereofona de Decca, kies kovrilo prezentas lin per teksto Esperanta. Diskoj kun Esperanta enhavo eliris lastatempe en rapida sinsekvo: "Philipp Zeska, Burgtheater, Wien, rakontas kaj recitas poezion de Boulton, Kabe, Kalocsay, Lippe, Schubert" (18 cm., 45 r/m, 12 steloj); "Ĉiun someron" k.a. kantoj bulgaraj (26 cm, 33 r/m); "Antaŭen!", du finnaj modkantoj (18 cm, 45 r/m, 6,— gld.); kaj fine nin atingis "Meksikio kantas", eldonita en 1967 (18 cm, 33 r/m). Aliaj muzikaĵoj: "Wieniawski-kajero" (Muzilo, 28 p.), "Kantaro internacia" (japana kompilaĵo, 4 steloj), kaj "Flugas kanto tra la mondo", bulgara kolekto 70-paĝa kun muziknotoj (prezo indikita: 1,41 levoj).

El la pasinta jarcento

Eldonejo KOKO laŭdinde daŭrigas sian foto-represadon de praverkoj. Ni ricevis: "La ge-fratoj" de Goethe (tr. Grabowski, 1889) kaj du rusaĵojn: "Princino Mary" de Lermontov (tr. de Wahl, 1889) kaj "La neĝa blovado" de Puŝkin (Grabowski, 1888). Ili kostas po 5,— gld.

La Kongresa lando donis al ni 23-paĝan

fantazian rakonton "Filozofio de fantomo" de W. Fernández Flórez, plaĉe ilustritan, kaj 2 librojn ĉ. 300-paĝajn: la romanon katalunan "Soleco", ankaŭ ĝi ilustrita (15,— gld.) kaj religian verkon "Vojo" de José María Escrivá de Balaguer (7 gld.). Dume, orienta Eŭropo liveris teatraĵon de Ján Kákoš, originale slovakan, "Mohajra plejdo" (13 ĉ. kr.) kaj novan legaĵon por infanoj, "Fabeloj" de la hungara aŭtoro Johano Dorosmai. Lasta en tiu ĉi kategorio (belliteraturo), sed certe ne la plej malgrava: Serio Oriento-Okcidento n-ro 9, "El la vivo de Syunkin" de Tanizaki, alvenis aere el Japanujo (bind. 14,— gld; broŝ. 11,—).

Postmorta libro de Ĉunoŝin Jui

Restas mencii du historiajn eldonaĵojn: "Auschwitz (Oświęcim) 1940-1945" (105 p., ilus.) kaj "Viktimoj de la atombombo", traduko de la sinbruliginta s-ro Ĉunoŝin Jui (prezo indikita: \$ 1,50).

Mendojn de novaj eldonaĵoj oni bv. adresi al la Libroservo de UEA. Ĉe novaj eldonaĵoj ne ĉiam eblas tuj indiki prezon aŭ fiksi prezon en guldenoj aŭ steloj. Al ĉiuj prezoj aldoniĝas 10 % por afranko.

Varsovio triobligas

ESPERANTO EN RADIO

Informojn pri radio sendu al s-ro G. Largantier, 29 Bd. Murat, F-75-Paris (16e), Francujo. Por aliaj detaloj vidu la juli-aŭgustan eldonon.

POLA RADIO. Ekde la mezo de oktobro, Radio Varsovio, kiu ĝis nun elsendadis en Esperanto ĉiutage, triobligos la elsendotempon! Varsovio estonte elsendos malsamajn Esperanto-programojn je la horoj 15.30 GMT (kiel ĝis nun) kaj 22.30. Tiu lasta elsendo estos ripetata matene, je 05.30.

RADIO ROMA. I-IX, Tra la literaturo; 3-IX, Novaĵoj el Italujo; 15-IX, Italaj kanzonoj en Esperanto; 22-IX, Leterkesto; 29-IX, Kristana mondo; 6-X, La itala poeto Ugo Foscolo; 13-X, La lago de Idro; 20-X, Tualeto de la romaj virinoj; 27-X, La sinagogoj de Venecio. La dua parto de ĉiu dissendo estas dediĉata al "Kuriero de Esperanto". Redaktoro: Luigi Minnaja.

BRITA RADIO (B.B.C.). La lunda programo per la stacio Stoke on Trent nun okazas duonhoron pli malfrue, tio estas de 18.00 ĝis 18.15 (ĝis 18.30 la kvaran lundon de ĉiu monato). Tiu-ĉi programo estas ripetata merkrede je 14.00. Aŭskultebleco nur loka per modulita frekvenco.



Redaktoro de
Pola Radio
Jerzy Uśpieński

KAPITALO HODLER 68: UNUA CENTMILO ATINGITA !

La eĥo de la artikolo sur paĝo 97 de la jul/aŭg. numero de la revuo Esperanto kaj de ampleksa korespondado estis tiel forta, ke jam antaŭ la Kongreso en Madrid la sumo de 100 000.— gld., kvinono de la celita sumo, estis atingita. Proksimume du trionoj de tiu sumo konsistas el obligacioj, dum unu triono reprezentas donacojn. Ni plej varme dankas al ĉiuj, kiuj tiel rapide reagis. La atingita sumo kaj multaj entuziasmaj leteroj montras, ke la iniciato ĝuas plenan aprobon de la membraro, kaj tio signifas grandan kuraĝigon por daŭrigi la kampanjon.

Donacoj por la Kapitalo, en kiu ajn grandeco aŭ malgrandeco, estas volonte akceptataj, kaj ĉiuj estos same alte aprezataj. Ja por unu membro sumo de 5.— gld povas signifi pli multe, ol por alia 1000.— gld. Same ni emfazas, ke membro, al kiu ne konvenas aĉeti obligacion aŭ kontribui per donaco, nepre ne sentu sin devigita senkulpigi sin pro privataj cirkonstancoj.

Koncerne la obligaciojn, necesas akcenti, ke ne temas pri obligacioj, kiuj eniros la ĝeneralan borsan komercon. Iuj membroj informiĝis ĉe sia banko, ĉu tie niaj obligacioj estas konataj. Tiel ne estas, ĉar temas pri internaj

pruntoj de privata organizaĵo. La obligacioj restas interne de UEA kaj validas en ĝia kadro, sed ne tuŝas borson aŭ bankojn. Signifas ankaŭ, ke ne necesas peti specialan permeson de aŭtoritatuloj por pagi tiajn "obligaciojn". Se en iu lando monsendoj al eksterlando estas limigitaj, oni povas sendi la sumon por UEA-obligacio al Rotterdam per pluraj malgrandaj partopagoj.

La obligacioj estos numeritaj laŭ sinsekvo de la mendoj. Do, kiu frue mendas, ricevas malatan numeron. Sed ĉiam restos ebleco poste, eĉ post kelkaj jaroj, ankoraŭ aĉeti obligaciojn aŭ fari donacojn por la Kapitalo. Se post 6 aŭ 10 jaroj respektive iuj obligacioj revenos, tiuj estos denove proponitaj je vendo dum la antaŭaverta jaro, tiel ke poste ankaŭ novaj membroj havos la eblecon akiri obligaciojn.

En momento de presigo de tiu ĉi artikolo la sumo atingita estas 110.000.— gld. Ĉiu, kiu povas kaj intencas kontribui al la nova kapitalo, helpu ĝian rapidan kreskon! Plej koran dankon al ĉiuj!

M. H. Vermaas,
Komisiito por Specialaj Taskoj



FORPASIS HANS KÜRSTEINER, Honora Prezidanto de UEA

NEKROLOGOJ

HANS KÜRSTEINER (1885-1968)

La 53-an Universalan Kongreson en Madrid atingis telegramo pri la morto de Hans Kürsteiner, Honora Prezidanto de UEA de 1947 ĝis la morto. Lerninte Esperanton en 1908, s-ro Kürsteiner fondis la grupon en St. Gallen, Svisujo, kaj poste servis kiel ĉefdelegito de UEA. Li estis iama gvidanto de la svisa movado kaj prezidanto de UEA de 1941 ĝis 1948. Ĉe la funebra ceremonio la 6-an de aŭgusto parolis en la nomo de UEA s-ro Otto Walder.

GÖSTA HENRIKSSON

La 1-an de majo 1968 mortis en Malmö (Svedujo), 70-jara, la malnova membro kaj fakdelegito de UEA Gösta Henriksson, aŭtoro de "Per motorciklo en tri landoj" kaj aliaj verkoj.

MAREK PIETRZAK

Nur 30-jara mortis la 29-an de majo 1968 la konata junulara aktivulo Marek Pietrzak. Li estis estrarano de TEJO de 1959 ĝis 1966, ĝenerala sekretario de TEJO 1961-63 kaj dufoje ĝia vic-prezidanto. Ankaŭ en la landa junulara movado li tre aktivis: li kunfondis Pola Esperanto-Junularo, kies unua prezidanto li fariĝis. Ekster la movado li atingis la rangon de estrarano de Pola Studenta Asocio.

HENDRIK J. BLOKPOEL

La 17-an de julio subite mortis s-ro H. J. Blokpoel, dumviva membro de UEA kaj delegito en Nunspeet, Nederlando.

SIMON CSÓRA (1904-1968)

La 21-an de junio forpasis Simono Csóra. Iam konata kiel Cseh-metoda instruisto, li laboris kelkajn jarojn ĉe la Internacia Esperanto-Instituto en Hago. Dum 10 jaroj li redaktis "Hungara Fervojista Mondo", kaj en 1962 li organizis la elstare sukcesan kongreson de IFEF en Budapeŝto.

OFICIALA INFORMILO

N-ro 415, 1 aŭgusto 1968

NOVA PERANTO DE UEA

IRLANDO

S-ro Patrick J. O'Reilly, administranto, "Woodbine", Bluebell, Dublin 12; tel. (hejme) 501128, (oficejo) 46242.

NOVAJ DELEGITOJ

AŬSTRALIO

Canberra. FD (Instruado: teknika), (Turismo): William Amies, teknika instruisto, 21 Boorondara St., Reid, A.C.T. 2601; tel. 497426.

Perth. FD (Fotografio amatora), (Meteorologio): Douglas Thorp, meteorologo, 84 Alexandra Road, East Fremantle, W.A. 6158.

Sydney. FD (Kooperativismo): F-ino Audrey Dennys, sekretariino, 9 Cathers Court, 41 Frenchs Road, Willoughby, 2068, N.S.W.; tel. (oficejo) 41-8959.

BELGUJO

Antwerpen. FD (Turismo): Renato Balleux, Oude Donkiaan 83, Deurne-Antwerpen; tel. 300572.

BRAZILIO

Bajé. VD, FD (Instruado): S-ino Dolores Biddone Medina, instruistino, Avenida 7 de Setembro, 680.

FD (Kooperativismo), (Mekaniko): Clovis V. Tanhott, mekanikisto, 8-a Residência-D.A.E.R., Caixa Postal 369; tel. 776.

ĈEĤOSLOVAKUJO

Novosad (Slovensko) 1300. D, FD (Farmacio), (Turismo): Florián Krajník, apotekisto, okres Trebišov; tel. 316.

FINNLANDO

Kuopio. JD: Jussi Jäntti, studento, Vuorik. 35 A 1.

Somero. FD (Stenografio: Intersteno): Joel Vilkki, emer. rektoro, Somero 9; tel. 924-45091.

Tammela. FD (Stenografio: Intersteno): la FD (Instruado).

GERMANUJO

D-757-Baden-Baden. FD (Blinduloj): F-ino Ingrid Böhringer, stenotajpistino, Felsenweg 5; tel. 7714.

D-6430-Bad Hersfeld. FD (SOS-aŭto-servo): la D.

IRLANDO

Dublin. D: Patrick J. O'Reilly, administranto, "Woodbine", Bluebell, Dublin 12; tel. (hejme) 501128, (oficejo) 46242.

FD (Tipografio): Jeremy Addis, eldonisto, Kingston House, Ballinteer, Dublin 14: tel. 983392.

JUGOSLAVIO

Kruševac (Srbija). 40 000. FD (Turismo): Momčilo M. Pavlović, instruisto, Dragomira Gajića N-8/II.

NEDERLANDO

Eindhoven. FD (Geodezio: katastro), (Ornitologio): la D.

NORVEGUJO

Hamar (Hedmark) 12 000. D, FD (Fervojo), (Turismo): Per Engen, inspektoro, 2312 Ottestad; tel. 21560-178.

Kristiansund N. D: la FD (Religio: Ev. Kristanismo).

SUD-AFRIKO

Alberton (Transvaal) 51 000. FD (Framasonismo), (Ruĝa kruco): Henri W. Appel, konstruad-direktisto, 8 St. Michael Road, New Redruth; tel. 869-4031.

USONO

Cleveland (Ohio) 1 000 000. D, FD (Juro): Kevin Sheard, profesoro pri juro, 1240 Ontario St., Cleveland, Ohio 44113; tel. (oficejo) 781-6612, (hejmo) 991-1824.

NE PLU VALIDAS (en Jarlibro 1968)

Aŭstrujo: Salzburg. **Danlando:** Kolding (D). **Finnlando:** Suonenjoki. **Francujo:** Clermont (FD Meĥaniko). **Germanujo:** Baden-Baden (JD), Edenkoben. **Hispanujo:** Barcelona (FD komercvojaĝoj), Daroca, Mataró, Sabadell (D), Santa Cruz de Tenerife, Zaragoza (FD bibliotekaj aferoj), (FD turismo). **Kanado:** Waterloo. **Nederlando:** Maassluis, Nunspeet. **Norvegujo:** Drammen. **Nov-Zelando:** Takapuna (VD). **Sovet-Unio:** Dnepropetrovsk. **Svedujo:** Malmö (FD Literaturo), Motala (JD), Norrköping (FD edukado), (FD radioamatorismo). **Usono:** Orlando.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Halder, s-ro Abani, Santiniketan, Hindujo.
Jerković, ing. Bogdan A., Isfahan, Irano.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1968

270 d'Amorim, d-ro Nid Dutra; 271 Braga, s-ro I. Gomes, Brazilo. 272 Ericson, s-ro Å; 273 Lidell, s-ro Ville; 274 Lindström, s-ro B. Svedujo. 275 Jayet, f-ino E., Svislando. 276 Correa, s-ro Affonso, Usono.

DONACOJ (Gld.)

Generala kaso. Belgujo: Vokal, s-ro H., 15,—.
Por T.E.J.O. Nederlando: Maasbommel, f-ino E. M., 10,—.

Fondaĵo Canuto (Por membrigi personojn en landoj kun transpagaj problemoj). Germanujo: Ohme, s-ro A., 1 J-MA.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

Universala Esperanto-Asocio

KOREKTOJ DE JARLIBRO 1968/I.

Sub Finnlando, urbo Lohja, la teksto devus esti: D: Vilho Nyström, instruisto, Linnaistenk. 6 A 6. VD: Lauri Vuolo, eksinstruisto, Salmenmäent. I B 10.



Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso: K.S.M., 12, Rue des Jacobins, F-63-Clermont-FD., Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

Universala Invalida Esperanto-Asocio, Box 5, 5594 Strib, Danlando, deziras kontakti ĉiujn invalidojn kaj handikapitojn de tuta mondo. U.I.E.A. estas kunlaboranta fakasocio kun UEA.

La Esperantista Kolektanto... reaperas, petu specimenon kaj sendu tekston por senpaga anonco al s-ro R. Melo, 15 rue de la Richelandière, 42 St. Etienne, Francujo.

Tutmonda asocio, kuraĝiganta la kredulojn preĝi por la mortintoj, ĉefe la plej forgesataj. Michel Pierru, 29 rue Baillon, 62-Calais, Francujo, plezure informas vin.

Sebastião Domingues, nevole malaperinta ekde 1963 sed nun reaperanta, petas de ĉiuj siaj iamaj gekorespondantoj, kiuj ankoraŭ eble deziras rekomenci korespondadon: bonvolu adresi aĵojn al Rua da Abolição 554-ZC 13, Rio de Janeiro, Brazilo (Vidu ankaŭ Jarlibron — delegita reto). Represo en esperantistaj gazetoj estas tutkore dankata.

Impulso, oficiala kvaronjara organo de Brazila Esperantista Junulara Organizo, Caixa Postal 18 — ZC 00, Rio de Janeiro. Jarabono 5 int. resp. kup. aŭ egalvaloro. Sciencaj, literaturaj kaj primovadaj artikoloj.

Irlando. Petu la novan senpagan multkoloran broŝuron de: Esperanto-Fako, Aer Lingus Irish Head Office, Dublin Airport. Ĝis revido — en Dublino!

35-jara kredanto-fraŭlino volus korespondadon kun similaj fraŭloj kaj fraŭlinoj. Adreso: Kaija Vuolle, postrestante, Helsinki 10, Finnlando.

Korespondas per sonbendoj: W. Meijns, Paul Krugerstraat 13, Wormerveer, Nederlando. Hobioj: arta muziko, turismo.

Guanabara E-o-Junularo, Caixa Postal 18 ZC 00, Rio de Janeiro, Brazilo, bezonas ĉiajn materialojn por ekspozicio baldaŭ organizota.

Italaj geinstruistoj, geoficistoj, gestudentoj ekde 11-jaraĝaj deziras korespondi tutmonde. Respondo certa: Esperanto-Grupo, Prof-ino Ines Corona, via Milano 4, 09100 Cagliari, Italujo. (foto)

ANONCETOJ

Tarifo: 0,45 gld. aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj. Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj respondecas sole nur la anoncantoj.

S-ro Mehmet Telyakar, 29-jara, deziras edziĝi kun riĉa fraŭlino el la libera mondo. Adreso: Aydinlik Sokak 23, Ortaköy-Istanbul, Turkujo.

Kutimiĝu al internacia parolmaniero per aŭdado de sonbendoj. La Magnetofona Servo de UEA, (2427 Padstow Cres., Clarkson, Ont., Kanado), povas rekomendi al vi modelajn registraĵojn kaj sendi, kontraŭ 1 respondkupono, kompletan liston de siaj programoj. **Lernejoj!** Partoprenu kun viaj klasoj en la lernigaj rondoj "Grajnoj en Vento". Unikaj en la mondo! Grajnoj en Vento, rue des Pins 66, CH-2500 Bienne-Biel 7, Svislando.

Ĉu vi volas havi agenton por viaj fabrikaĵoj, artaĵoj, ktp, en Nordcentra Usono? Pluraj kontaktoj kun ĉenvendejoj kaj fabrikistoj. Pago nur per procentaĵo. Dumviva membro de U.E.A. Priskribu vian proponon al R. T. Sandberg, 5238 S. Kenwood, Apt. 1, Chicago, Ill. 60615, Usono.

Amico del Mondo (Amiko de la Mondo) — organizaĵo por la disvastigo de Esperanto — senpage vin kontaktigos kun propraj gelnantoj kaj eksaj gelnantoj. Skribu, precizigante la temojn, pri kiuj vi interesiĝas, al: "Amico del Mondo, Via Podgora 13, I-20122 Milano, Italujo."

Junuloj atentu! Se vi estas sufiĉe lerta por instrui Esperanton (po 1 leciono tage), vi ricevos senkostajn restadon kaj instruon pri internacaj aferoj, sociologio kaj lingvoj en la konata Internacia Altlernejo en Helsingør, Danlando, dum la venonta sezono (1 okt. 1968 ĝis julio 1969). La instrulingvo estas la angla; tial necesas kompreni la anglan. Por ricevi detalojn, sendu informojn pri vi mem kaj laŭeble rekomendojn al s-ro E. Langkilde Rasmussen, Ingemannsvej 18, DK 3000 Helsingør.

KORESPONDEMULOJ!

Se vi publikigos korespondo-peton en nia revuo, kunsendu vian FOTON. Ĉiunmonate la redakcio elektos kelkajn fotojn de korespondantoj-anoncantoj por **SENPAGA** aperigo apud la koncernaj pagitaj anoncetoj! Kaptu la okazon!

ESPERANTO

estas la plej internacia Esperanto-revuo en la mondo, kun legantoj en ĉ. 80 landoj

ESPERANTO

estas via revuo kaj dependas de via apogo

Diskonigu ĝin! Varbu por ĝi
abonantojn (18,75 gld. jare) kaj
Membrojn-Abonantojn (25,— gld. jare)

Petu kvanton da aboniloj de la Centra Oficejo
de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2,
Nederlando

Sendigu specimenan ekzempleron al viaj amikoj
ne-abonantoj

LA LIBRO, KIU DONAS RESPONDON AL LA ĈEFAJ DEMANDOJ EN LA MODERNA ESPERANTO-MOVADO

Kontribuo de niaj kongresoj al internacia kompreniĝo - Esperanto antaŭ Unesko - La kultura valoro de la Internacia Lingvo - Ideologiaj elementoj de esperantismo - Internacieco de Esperanto - Ne eŭrope, sed monde internacia - Humanisma internaciismo kaj la Internacia Lingvo - Matura lingvo por matura bezono - Kontraŭ la lingvan diskriminacion - La lingva problemo en la internaciaj rilatoj...

Ĉio ĉi kaj multaj aliaj temoj en

ELEKTITAJ PAROLADOJ KAJ PRELEGOJ

de

Ivo Lapenna

Kvankam suplementa al la fama RETORIKO, la libro estas tute memstara, kaj ĉiu parolado aŭ prelego prezentas sendependan kaj kompletan tuton. Kun antaŭparolo de prof. Waringhien.

152 p., formato 20 x 15 cm (kiel Retoriko), plaste bindita. Prezo: 11 gld. aŭ 44 steloj. Mendu ĉe UEA aŭ ĉe via landa libroservo.

La Monda Lingvo-Problemo

SOCIA-LINGVISTIKA-PSIKOLOGIA-EKONOMIKA-JURA-POLITIKA

Redakta Komitato: C. J. Adcock, G. Bárczi, C. C. Berg, E. A. Bokarev, A. Capell, V. Georgiev, Z. Klemensiewicz, I. Lapenna, B. Migliorini, M. Pei, G. Waringhien, E. Wüster.

Redaktoro: V. Sadler

Vol. I

Jan. 1969

N-ro 1

VICTOR SADLER

IVO LAPENNA

ARTHUR CAPELL

J. B. RUDNYCKYJ

M. VAN HAEGENDOREN

THÉODORE GUTMANS

R. L. HARRY

(Aperos la 10-an de decembro 1968)

Editorial.

La situation juridique des "langues officielles" avant la fondation des Nations Unies.

The limits of second language learning.

Linguizid; Ein Beitrag zur Soziolinguistik.

La origins of the language shift in Flanders.

L'interprète de conférence dans le monde moderne.

The language problem in diplomacy.

Ampleksaj resumoj en Esperanto

Eldonas:

Mouton & K-io, Hago-Parizo.

Sub aŭspicio de CED.

Peranto: UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando; pĉk. 37 89 64.
Jarabono (unua jarkolekto 1969: 3 x 64 paĝoj): 25 gld.; \$ 7; £ 2.18.0; Fr. Fr. 34; DM 28.

La Centra Oficejo de UEA serĉas

JUNAN HOMON

por la ofico de

KONSTANTA KONGRESA SEKRETARIO

La kandidatoj devas posedi bazan scion pri librotenado, devas bone prezentigi (por rilatoj i.a. kun oficialaj instancoj) kaj devas povi eklabori en la unuaj monatoj de 1969 (prefere ĉirkaŭ aprilo) por plene transpreni la oficon en aŭgusto 1969.

Sinproponojn, kun kompletaj informoj pri aĝo, scio de diversaj lingvoj, ĝisnunaj oficoj kaj studoj, dezirata salajro ktp., oni direktu al:

La Direktoro,
Centra Oficejo de UEA,
Nieuwe Binnenweg 176,
ROTTERDAM-2, Nederlando

LA CENTRA OFICEJO DE UEA SERĈAS KVALIFIKITAN LIBROTENISTON

por la ĝenerala gvidado de la librotena fako kaj pro ĉiujara kompilado de speztabelo, bilanco k.s. Kandidatoj devus esti pretaj eklabori antaŭ la 31-a de decembro 1968, por laŭeble transpreni la oficon komplete en la venonta jaro. Informojn pri kvalifikaĵoj, aĝo ktp. oni bv. adresi al la direktoro de la C.O., Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Ned.

ÅRHUS

La internaciaj feriaj aŭtunaj Esperanto-kursoj okazos 13. — 19. de oktobro en la altlernejo JUNAJ HEJMOJ (tute moderna) en Århus, Danlando. Venu por ĝui belan feriosemajnon en vere Esperanta rondo kaj dum tempo, kiam la proksimaj arbaroj portas sian plej multkoloran veston. Prospekto senpage havebla ĉe

L. Friis,
Ingemannsvej 9,
Åbyhøj, Danlando.

ESPERANTO-ARABA POŝVORTARO



La unua Esperanto-vortaro de la araba lingvo, kun bele kolorita kovrilo. Enhavas 6000 vortojn, el kiuj pli ol 700 estas komunaj inter la du lingvoj, indikitaj per substrekitaj dikliteroj. 300 paĝoj el bonkvalita papero. Prezo: 10 internaciaj respondkuponoj.


Ambaŭ libroj mendeblaj ĉe UEA aŭ rekte ĉe la aŭtoro:

**D-ro Nassif Isaac, P.O. Box 1221,
Cairo, Egiptujo**

Mendantoj ĉe la aŭtoro povas ricevi la du librojn kune por nur 12 rpk., inkluzive sendon per registrita poŝto.

VOJAĜIMPRESOJ DE EGIPTO

tra Azio kaj Eŭropo per Esperanto



La unua tia okazaĵo en la mez-oriento. Libro originale verkita en Esperanto, kun bele kolorita kovrilo. Prezo: 5 internaciaj respondkuponoj.